

Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2014 numero 1-a: januaro-februaro 2014
dissendo je la 15-a de januaro



Ne nur ĝuu pri viaj migradoj en nia bela lando, sed ankaŭ ekkonsciu pri via propra respondeco koncerne al la vivo de esperanto en Svislando. Certe indas pozitive respondi al la alvoko de la estraro de SES, kiu bezonas vian helpon.

**La estraro de SES
bezonas novajn fortojn!!
Anoncu vin!!**



Fotis Mireille Grosjean.

Dum la solena malfermo de la Afrika Kongreso Privas Tchikpe, la prezidanto de la Kongresa Organiza Komitato, salutas la vicurbestron de Kotonouo.



Fotis Mireille Grosjean

Dum la preparlaboroj al la Afrika Kongreso : pretigo de la kongresaj sakoj.



Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luc Allemand
www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro

Januare 2014

18 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
25 : Etoy : Kunvenas la Svisa Koruso.

Februare

3 : Lausanne : LES Ĝenerala Asembleo.
10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
15 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
23 : Etoy : Kunvenas la Svisa Koruso.

Marte

3 : Lausanne : LES-kunveno.
8 : Chaux-de-Fonds : Asembleo de la Amikaro de CDELI kaj kultura programo pri Ed. Privat.
15 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
23 : Etoy : Kunvenas la Svisa Koruso.

Aprile

4-6 : Storckensohn/Mulhouse : 17a E-o-Staĝo.
5 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Metodika kleriĝo kun Claude Gacond pri la uzo de la instru-afiŝoj.
7 : Lausanne : LES-kunveno.
14-21 : Xanten (DE) : Paska Printempa Semajno.
26 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato
27 : Etoy : Kunvenas la Svisa Koruso.

Maje

3 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Metodika kleriĝo kun Claude Gacond pri la uzo de la instru-afiŝoj.
17 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
18 : Yverdon : SES-Ĝenerala Asembleo.
31 ĝis junio 2 : Chambéry : Franca-Kongreso.

Junie

6-9 : Erfurt (DE) : Germana E-o-Kongreso.
21 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Julie

1 : Redakta datlimo de *SES informas*.
9-16 : Dinano Bretonio : 87a SAT-Kongreso.
25 ĝis aŭg.2 : Buenos Aires : 99a Universala K.

Aŭguste

23-30 : Trento : 81a Itala Kongreso de Esperanto.

Septembre

6-7 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Renkonto kun la verkisto kaj eldonisto André Cherpillod.

Oktobre

4- : Chaux-de-Fonds : CDELI : Metodika kleriĝo kun Claude Gacond pri la uzo de la instru-afiŝoj.

Organizantoj de kursoj kaj stud-kunvenoj

Basel : Esperanto-Societo Basel : PF 178, 4005 Basel, tel : 0049 76 214 57 12.

La Chaux-de-Fonds : CDELI, Bibliothèque de la Ville, strato Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. claude.gacond@ne.ch, tel : 032 967 68 42.

CDELI-Studsabatoj : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna studsabato ĉe Nancy Fontannaz : Rete: nancy.fontannaz@gmail.com, tel : 021 728 31 27.

Lausanne : Laŭzana Esperanto-Societo : CP 246, 1000 Lausanne 22.

www.esperanto-lausanne.ch tel : 021 647 29 28. www.eo-l.ch .

Genève : Grupo La Stelo : CP 734, 1212 Grand-Lancy 1, tel : 022 771 24 37.

kaj Asocio Esperanto-Genève-Régions : esperantoegr@gmail.com

Wil : Esperanto-Klubo : <http://esperanto.ch/wil>.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,
CH-2300 La Chaux-de-Fonds
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch
Tel. : hejme: 032 926 52 32
êe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller.

Redaktaj datlimoj

2014-2 : marto-junio :
februare 10, dissendo 1-an de marto.
2014-3 : julio-oktobro :
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.
2014-4 : novembro-decembro :
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.
2015-1 : januaro-februaro :
decembre 15, dissendo 10-an de januaro.

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Marie-Louise Mûnger, Rue Centrale 4, 2112
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Komisiito pri financoj : Hans-Werner
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ. Tel. : 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Kontonumero de SES (POSTFINANCE)

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds
17-581908-4
(por kotizoj kaj donacoj)

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch



Vivo de SES

Redaktis Claude Gacond

Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto Societo SES Dimanĉe la 18-an de majo 2014 Yverdon=les=Bains, restoracio La Grange (en la blanka Casino) (Apud la stacidomo)

Pliaj informoj aperos en la sekva bulteno SES informas 2014-2

Tagordo:

1. Bonvenigo, kontrolo de la ĉeestantoj kaj anonco pri senkulpiĝoj. Anonco pri registrado.
2. Aprobo de la tagordo.
3. Elekto de protokolanto.
4. Elekto de voĉnombrantoj.
5. Evoluo de la membraro.
6. Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2013.
7. Vivo de la societo : Aprobo de la Estrar-raporto.
8. Konsisto de la Estraro. Elektoj.
9. Raporto de la laborgrupo pri statutmodifoj (art. 3). Eventuale voĉdono pri tio.
10. Financoj. Prezento de la jarkalkulo kaj ties aprobo.
11. Elekto de kaskontrolantoj.
12. Projektoj por 2014 :
 - 1) Postsomera kunveno sabate la 6-an de septembro.
 - 2) SFERO de la 17-a ĝis la 19-a de oktobro.
13. Projekto por 2015 :

Tutmonda Konferenco pri Instruado de Esperanto kaj subteno de SES.

14. JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI sekcio), SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo k.s. Raportontoj bonvolu anonci sin al Mireille Grosjean antaŭ la kunveno.

15. Buĝeto 2014. Prezento kaj aprobo.

16. Diversaĵoj. Tie venu iaj informoj. Tamen tie ni ne povos trakti ion, kiu influas la buĝeton, ĉar ni jam estos aprobinta ĝin.

Proponoj : Ili devas atingi Mireille Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets aŭ rete per mirejo.mireille (ĉe) gmail.com aŭ Dietrich Weidmann ĝis la 26a de februaro 2013.

Proponoj devas esti subtenataj de minimume tri personoj.

-oOo-

Svisa Esperanto-Societo

Jarraporto pri la jaro 2013

Membraro

SES nombras 140 membrojn je la fino de la jaro 2013. Inter ili estas 7 junuloj. Malaperis 15 membroj pro malaliĝo aŭ ne repago de kotizo. 5 novaj membroj aliĝis. Ni bonvenigas ilin. Honoraj membroj de SES estas du : Lucienne Dovat kaj Claude Gacond.

Financoj

22 personoj fariĝis patronoj de SES pagante la duoblon de la normala kotizo. Entute nun estas 7 dumvivaj membroj de SES.

Niaj membroj estas malavaraĵoj kaj deziras helpi al niaj aktivecoj. Ni ege dankas al ili. Pri donacoj de nia membraro bonvolu legi ĉi sube pri la Afrika Kongreso.

Nia komisiito pri financoj Sinjoro Hans-Werner Grossmann daŭre plej efike zorgas pri niaj financoj kaj nia adresaro. Ni dankas lin elkore pro lia regula kaj efika laboro.

Aktivecoj

La **estraro** kunvenis en Rejkjaviko dum la UK ! Unue malferme de la Universala Kongreso komence de la komitata kunsido, ĉar urĝis decido : Mireille Grosjean, ĵus elektita prezidanto de ILEI, estis plie nomumita Komitatano A nome de ILEI. Do la komitataneco por SES vakis. La estraro de SES surloke elektis Sinjoron Dietrich Weidmann Komitatano A nome de Svislando. Dua kunveno de nia estraro estis dum la svisa vespermanĝo en Islando : tie dudeko da personoj, svisoj kaj ne svisoj, partoprenis.

Per skajpo la estraro sekvis la evoluon de nia Societo, diskutis pri niaj agadoj kaj prenis la adekvatajn decidojn. Kunveno okazis per skajpo la 22an de februaro 2013 kaj diversaj interŝanĝoj okazis per retmesaĝoj aŭ telefon-alvokoj.

La 23an de marto 2013 okazis **ĝenerala kunveno de SES** en Staad (SG). Partoprenis proksimume 25 personoj kun surpriza vizito de du virinoj el najbara Aŭstrio. Vigla debato okazis en pozitiva etoso. La kultura parto de tiu evento estis vizito de la bazaro-halo de Altenrhein, majstroverko de la aŭstria artisto Hundertwasser. En tiu salonego nia Svisa Esperanto Koruso kantis, dum multaj

artistoj ekspoziciis siajn verkojn cele al vendo. Do bunta salono kun bunta enhavo. Inter tiuj artistoj estis la filino de nia forpasinta membro Sinjoro Fritz Liechti el Zuriko.

Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj de Svisa ILEI-Sekcio (SIS), CDELI organizas **studsabatojn** ĉiun trian sabaton de la monato. Ili estas plej bona okazo por lerni la lingvon kaj/aŭ progresi, ĉefe por aŭdi la lingvon, paroli ĝin kaj profiti je ĉeesta instruado. Fidele kunvenas proksimume deko da gesamideanoj. Komuna tagmanĝo arigas la gestudentojn kaj aliajn surlokajn esperantistojn en varma etoso. Instruas tie ĉefe Mónica Molnár, Luc Allemand, Nancy Fontannaz, Stefano Keller kaj Nicole Margot. Danielle Carrier helpas en la organizado. La SES-estraro varme dankas ilin. Ĉiuj klarigoj aperas sur <http://www.cdeli.org/samedis/>

CDELI estas ne nur **arkivejo**, sed ankaŭ multe pli. Ĝi estas **kursejo**, vidu supre pri la studsabatoj. En CDELI ankaŭ eblas **aĉeti librojn**, lernolibrojn, vortarojn, k.s. CDELI estas nia libroservo. Preskaŭ ĉiutage deĵoras tie Claude Gacond, kaj po du tagojn semajne laboras la bibliotekistino Martine Schneller kaj ŝia edzo Richard Schneller. Same regule kunlaboras po unu tagon semajne Andrée Gacond, Nancy Fontannaz, Danielle Carrier kaj Stefano Keller, kiu krome kunlaboras en la kreado kaj aktualigo de la retpaĝoj de la Asocio Amikoj de CDELI, www.cdeli.org. Plie li registras sur la retejo la elsendojn de Arthur Baur faritajn ĉe Svisa Radio Internacia. Por tiu lasta laboro li estas salajrita fare de SES. Gratulon kaj dankon al ĉiuj.

Fine de marto okazis **SAT-Amikara Kongreso** en Métabief, en apuda Francio, organizita de Mireille Grosjean. Pluraj svisoj partoprenis. Jolane (Joëlle Grosjean, filino de Mireille) donis tie koncerton kantante en diversaj lingvoj.

Okazis la tria **postsomera renkontiĝo** en Bielo la 31-an de aŭgusto. La 4 esperantistoj per ŝipo atingis la insulon Sankta Petro en la biela lago. Organizis la tagon Mireille Grosjean. Feliĉe estis belega vetero. La celo de tiu renkontiĝo estis, ke ĉiu rakontu pri siaj someraj aranĝoj, eventoj, kunvenoj, kongresoj. Tio okazis abunde.

Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo (SES) okazis **SFERO Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo** en Langnau en Emme Valo komence de oktobro. Skipo da junaj familioj organizas tiun ĉiujaran eventon tre valoran. Ni gratulas ilin elkore.

La 26-an kaj 27-an de oktobro okazis **Komuna Seminario organizita de SIS**: Svisa ILEI-Sekcio. 23 personoj partoprenis ĝin, el ili 6 personoj el Francio. Tri prelegoj interesis la publikon sabate posttagmeze. Dimanĉe matene la grupo vizitis CDELI-n sub la gvidado de Claude Gacond.

La 9-an de novembro okazis Eksterordinara Ĝenerala Asembleo de **Kultura Centro Esperantista** (KCE) en La Chaux-de-Fonds. Re prezentis SES-n kiel kutime Marion Bélisle. La asembleo inter aliaj decidoj aprobis, ke la Kultura Konsilio malaperu. Pro tio SES ne plu havos senpagan aliron al tiu Asembleo. Pro tio tiu deĵorado de Marion Bélisle estis la lasta. Ni elkore danku al ŝi.

La 25-an de novembro 2013 okazis mirinda kunveno en la hejmo La Rozavère en Lausanne, kie loĝas nia honora membro **Lucienne Dovat**. La Svisa Esperanto Koruso kantis buntan programon per belegaj voĉoj. Mireille Grosjean transdonis al Lucienne diplomon de UEA por celebri ŝiajn 50 jarojn de daŭra membreco. Proksimume 100 personoj sidis en la salono kaj partoprenis la kunvenon.

Post sia elekto kiel prezidanto de ILEI Mireille Grosjean prezentis la unuan **Tutmondan Konferencon pri Esperanto-Instruado** okazinta en Ĝenevo en la jaro 1922, kaj la duan en Prago en 1927. Ŝi anoncis intencon de lanĉo de la tria tia konferenco. En septembro 2013 si petis aŭdiencon ĉe la neŭŝatela edukministro Monika Maire-Hefti, tiu kunveno okazis la 5-an de novembro en la kastelo de Neuchâtel. La peto estas, ke la kantono kiel ŝtato invitu ĉiujn ŝtatojn de la mondo al Tutmonda Konferenco pri Esperanto-Instruado, kiu okazu en Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds. Tiel en ĉiu lando la registaroj devos esplori, ĉu io pri Eo okazas en sia teritorio. Tiu fazo estas fakte la plej grava en tiu entrepreno. La 29-an de novembro venis respondo de la Kantona Registaro : ni akceptas lanĉi la invitojn kaj donaci la bonvenigan aperitivan fine de la solena malfermo. Post pozitiva voĉdono pri la leĝpropono Alain Bringolf fare de la Kantona Parlamento en februaro 2009, post la pozitiva voĉdono pri la leĝpropono Pascale Gazareth fare de la Urba Parlamento de La Chaux-de-Fonds, la kantono plu iras sian kuraĝan vojon. Do : ek al la laboro! ILEI kaj SES devos trovi adekvatan taskodividon en tiu granda kaj grava projekto.

La 30-an de novembro 2013 **Kultura Centro Esperantista** pagis al la konto de SES la sumon de 15'000 CHF, sumon postulatan de la estraro de SES. Tiu postulo sekvis la anoncon de KCE, ke la sumo estis ĝirita al konto por SES ĉe Pro Esperanto. Per tiu pago KCE ne plu havas ian ŝuldon ĉe SES.

Dum decembro nia komisiito pri financoj Sinjoro Hans-Werner Grossmann anoncis al ni, ke li deziras liberiĝi de sia posteno. Ni komprenas tion sed tre bedaŭras lian decidon.

Novaĵoj pri la kvina **Afrika Kongreso de Esperanto**. Dum la Ĝenerala Kunveno de SES en marto la asembleo decidis, ke la Societo subtenu tiun eventon per mil frankoj. Plie ĝi decidis, ke SES skribu al siaj membroj por sugesti al ili private kaj libervole subteni la kongreson. Tiu alvoko alportis proksimume 3000 CHF. Mirinda sumo !! Grandega danko al ĉiuj donacintoj !! Raportoj sekvas en januaro 2014.

Informado al la ekstera mondo :

Gazetaraj komunikoj. Laŭbezone Mireille Grosjean sendas rapide gazetaran komunikon per la Reto. Paralele Dietrich Weidmann agadas en Germanio.

Por vastskale informi la publikon pri la studsabatoj de CDELI, Mireille Grosjean kreis afiŝojn kaj metis ilin, respektive sendis ilin tra la kantono de Neuchâtel ĝis Delémont, Saint-Imier, do al najbaraj lokoj. Helpis Dieter Rooke en La Chaux-de-fonds. Rezulto de tiu informado al publiko vidiĝas.

Alia maniero informi estas meti en la telefonlibron linion pri Esperanto. Tion oni povas fari nur en la telefonlibro de sia loĝloko. Mireille Grosjean faris tion en la telefonlibro numero 4 por la urboj Le Locle, La Chaux-de-Fonds kaj Neuchâtel kaj sia vilaĝo Les Brenets. Unu anonco kostas jare iom pli ol 20 CHF. Bonvolu pripensi pri sama agado en via regiono. Ne forgesu meti la vorton ESPERANTO en majuskloj.

« **L'Essor de l'Espéranto** » estas novaĵletero al diversaj instancoj romandaj. Mireille Grosjean zorgis pri tio ekde 2002 per papera sendado. La 7an de decembro 2013, post 22 numeroj paperaj, eksendiĝis la unua reta numero.

Diversaj agadoj okazis en 2013 :

Foiro de inventistoj en Ĝenevo, stando dum 5 tagoj, artikolo en ĵurnalo kun eldonkvanto 20'000. Tiu ĵurnalo iris al ĉiuj ĵurnalistoj laborantaj en Ĝenevo, ĉiuj NeRegistaraj Organizoj laborantaj en Ĝenevo, ĉiuj misioj kaj ambasadejoj ĉe UN en Ĝenevo.

Stando en Berno dum festo pri niaj 4 lingvoj « get together » , 17an de aŭgusto.

Stando en Berno la 24an de aŭgusto memore al la 100jara datreveno de la Berna Universala Kongreso en 1913. Tiun agadon proponis kaj organizis Benno Frauchiger. Ĵus antaŭ tio la gazeto « Der Bund » aperigis artikolon pri Eo.

Stando en Savagnier (NE) dum romanda kunveno de SEL (Service Echanges Libres).

Ekspozicio en CIFOM en Le Locle (NE). Tiu teknika lernejo grupigas 1200 studentojn.

Stando dum **kolokvo pri pacedukado** en Broc (FR) la 9an kaj 10an de novembro, kie Mireille Grosjean membras en la Organiza Komitato.

La 2-an kaj 3-an de novembro okazis en Ĝenevo **festivalo** organizita de Asocio pri socikulturaj interŝanĝoj. Danke al la perado de la ĵurnalisto Raymond Zoller, Mireille Grosjean povis tie prelegi pri « Esperanto, lingvo de paco » kaj pri « Svislando, mozaiko de kulturoj ».

Interna informado

Al niaj membroj :

Nia organo « *SES informas* » aperis kvarfoje dum la jaro kun valoraj informoj ne nur pri la vivo de la societo, sed ankaŭ kun kultura enhavo. Ni elkore dankas al la redaktoroj Claude Gacond, Richard Schneller, Nancy Fontannaz kaj Stefano Keller, kaj al la enkovertiganto André Sandoz. Bonvolu vidi <http://www.svisa-esperanto-societo.ch/SESi/>

Retejo

SES havas retejon www.svisa-esperanto-societo.ch

Tiu retejo estas prizorgata de Stefano Keller.

Plie Luc Allemand « nutras » la retejon regule pri okazontaĵoj. Bonvolu legi la paĝon www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro. Ni ege dankas al ili.

Retlisto « svislando »

Estas je nia dispono retlisto. Per ĝi oni povas rapide anonci ion. Uzante la retejon www.svisa-esperanto-societo.ch , vi povas vidi spacon pri tiu listo kaj per unu klako aliĝi.

Pasporta servo

Tiu mirinda reto ekzistas nun kaj papere kaj rete. Luc Allemand estas oficiala svisa peranto. En Svislando 10 personoj pretas gastigi vojaĝantojn.

Bv vidi www.pasportaservo.org .

Lokaj kaj fakaj grupoj

Lokaj kaj fakaj grupoj aktive kunvenadas kaj havas sian propran vivon ie kaj tie en Svislando. Por scii pri tio, kaze ke vi vojaĝadas en nia landeto, vidu nian organon

« *SES informas* » kaj nian retpaĝon. La estraro arde petas la lokajn grupojn anonci ties aktivecojn por aperigo en www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro.

La estraro de SES estas tre feliĉa pri tiu bunta agado tra Svislando kaj gratulas kaj dankas la lokajn organizantojn.

SES subtenas finance iun tutnacion kunvenon. Se vi havas intencon organizi tian kunvenon, bonvolu turni vin al la estraro de SES, por ke la buĝeto povu esti redaktita adekvate.

Universala Esperanto Asocio (UEA)

SES estas landa sekcio de UEA. La ligoj estas tre regulaj. Mireille Grosjean reprezentis SES-n ene de la komitato de UEA ekde 1998. Dum UK 2013 en Rejkjaviko, Islando, ŝi transdonis tiun oficon al Dietrich Weidmann.

Estas en Svislando 19 delegitoj laŭ la Jarlibro de UEA 2013. Nia ĉefdelegito estas François Randin el Lausanne. Li elektiĝis denove fine de 2013 por trijara mandato.

Pri UEA vidu www.uea.org

Sennacia Asocio Tutmonda (SAT)

Estas en Svislando 7 membroj de SAT. Richard Schneller respondecas pri SAT en nia lando.

Estas en Svislando 3 membroj de SAT-Amikaro. Mireille Grosjean respondecas pri SAT-Amikaro en nia lando.

Pri SAT kaj SAT-Amikaro vidu www.esperanto-sat.info

Internaciaj kontaktoj

Private multaj el niaj membroj vojaĝas al UK, al aliaj landoj. Ofte ili raportas en lokaj kluboj. Ofte ili raportas en *SES informas*. Ni tre dankas pro tiuj valoraj raportoj, kiuj interesas multajn el ni kaj ĉefe tiujn, kiuj ne povas vojaĝi al kongresoj kaj renkontiĝoj. Dum restado de la familio Kimura el Tokyo ĉe Mireille Grosjean, la edzo prelegis en Les Brenets la 23-an de junio dum kunveno organizita de GELB, Groupe Esperanto Les Brenets. La rusa pianisto esperantisto Andrej Korobejnikov ludis en Cully apud Lausanne.

Projekto Grundtvig

Komence de la jaro 2011 la estraro jesis pri propono partopreni Grundtvig-projekton. Tiu strukturo nestas ĉe Eŭropa Unio. Tamen Svislando rajtas partopreni. La temo de la kunvenoj estas « interkultura edukado, defio por diverseca Eŭropo » kaj rilatas al plenkreskuloj. Pluraj membroj de SES povis partopreni en 2013 tiajn kunvenojn en Barcelono (Katalunio) kaj en Bordojo (Francio). Kadre de tiu projekto okazadas renkontiĝoj por ĉiuj tiaj grupoj kun la gvidanto de tiaj projektoj, Fondumo *ch* en Svislando, proksimume 30. En septembro 2013 la gvidantoj de Fondumo *ch* petis nian kun-prezidantinon Mireille Grosjean paroli pri siaj spertoj kadre de lanĉa kunveno por la gvidantoj de la projektoj 2013-2015. Tion ŝi faris en Berno la 9-an de septembro 2013.

Bonvolu malkovri la laboron en rilato kun tiu projekto pri interkultura edukado : www.noos.ch/ideo

Pri Grundtvig ĝenerale bonvolu iri al la retejo de Fondumo *ch* www.ch-go.ch

Konklude

Legante tiun raporton vi povis observi, ke multaj diversaj personoj agadas en Svislando kaj transprenas taskon, kiu rilatas al iliaj kapablo, emo, eblo. Tio estas tre pozitiva fakto. La estraro de SES elkore dankas al ili. Tio estas signo de sana vigla movado.

Kotonuo kaj Uster, la 13an de decembro 2013

Nome de la estraro de SES

Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann

-oOo-

Donacoj al SES periodo oktobro-novembro 2013

Buhlmann David : Fr 60.-, Carlevaro Tazio kaj Teresita: Fr 100, Perret-Gacond François kaj Chantal: fr10.- Sume Fr 170.-

Patronoj 2013

Tazio kaj Teresita Carlevaro, Laurence Ducret Aidonidis, Andrée Gacond, Walter Gaxer, Emmanuelle Houlmann, Jean-Jacques kaj Eliane Lavanchy, Luciano Ortelli, Adrian Tanner, Jimmy Rivière, Alois Koller, Yvette Humbert-Fink, Traugot Rinaldo Aebi, Maria Benvenuti, Ruth Van Puijenbroek, Louise Bachmann, Cléa kaj Jean-Marie Robin, John Hasler, Dietrich kaj Nelida Weidmann.

Nome de SES dankas la Komitato kaj Hans-Werner Grossmann.

-oOo-

La svisoj abunde subtenis la kvinan Afrikan Kongreson de Esperanto

Svislando kaj la svisaj esperantistoj elstare kontribuis al subteno de tiu grava evento organizita de Mireille Grosjean tra la kanalo de « Scio Sen Bariloj » kaj de du aliaj establoj. Eĉ du svisoj subtenis private po unu afrikanon. Kaj SES laŭ decido dum la Ĝenerala Asembleo 2013 donacis Fr 1000, kio kovris la alvenon de unu afrikano kaj parton de lia kongreso. Post la alvoko al la svisaj esperantistoj venis multe da aliaj donacoj, kiuj ebligis financi la venon de 2 personojn. Do sume Svislando kontribuis al la partopreno de 5 personoj. Granda sukceso ! Granda danko al ĉiuj !

La kongreso estis sukcesa kaj okazis en tre bona etoso. 4 membroj de la Afrika Komisiono povis finfine rekte konatiĝi, fizike, vidalvide. Neforgesebla momento !

Ĉiuj kongresanoj malkovris tiun kongresan etoson, tiajn internaciajn kontaktojn, por la unua fojo. Ili enorme ĝojis kaj ĝuis.

Interesaj prelegoj aŭdiĝis, laborkunsidoj okazis, projektoj naskiĝis, motivigoj fortiĝis, lingvokapablo kreskis. Do mallonge : vere sukcesa evento !

Multaj fotoj vidiĝas same kiel legiĝas aliaj informoj en la blogo de Mireille Grosjean :

<http://mirejo3.blogspot.com/2014/01/kvina-afrika-kongreso-solena-fermo.html>

Jarkalkulo kaj Buĝeto

SES - Jarkalkulo 2013 kaj buĝeto 2014		Bilanco 31.12.2013		
1010	Poŝtkonto (17-581 908-4)	1'214.49		
1011	Poŝtsparkonto (92-7737-1)	34'955.20		
1090	UEA konto sesa-v (229.69 € je 1.2266)	281.74		
1100	Inventaro	277.00		
1150	Bonhavo antaŭimposto	70.35		
	Aktiva sumo	36'798.78		
2000	Transaj pasivoj (kotizoj 2014)	665.00		
2010	Fonduso: Muzika konkurso	3'000.00		
2100	Kapitalo 1.1.2013 44'588.35 Plielspezoj -11'454.57	33'133.78		
	Pasiva sumo	36'798.78		
		Jarkalkulo 2013	Buĝeto 2013	Buĝeto 2014
3000	Informado, varbado	2'956.45	5'000	5'000
3010	Laborrimedoj, omaĝoj	199.20	200	200
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	4'422.30	4'000	1'600
3110	SES informas elspezoj	1'747.90	2'500	2'500
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj ĜK, estraraj, regionaj)	214.75	900	500
3200	Kotizoj al UEA, EEU, KoToPo	290.70	200	200
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp)	204.65	400	400
3220	Bank- kaj poŝtspezoj kaj kurzdiferencoj	52.47	150	150
3230	Donaco al KCE	412.50	450	
3310	Valorigado de la elsendoj de Arthur Baur	7'750.00	9'500	1'750
3500	Diversaĵo	186.00	300	300
	Elspeza sumo	18'436.92	23'600	12'600
4200	Membrokotizoj	4'680.00	4'500	4'500
4210	Abono al SESi sen membreco	450.00	500	500
4300	Donacoj, heredaĵoj	1'248.00	1'500	1'500
4600	Interesoj: bankaj, poŝtaj (kaj de KCE)	534.35	550	100
4800	Diversaĵo	70.00		
	Enspeza sumo	6'982.35	7'050	6'600
	Plielspezoj	11'454.57	16'550	6'000

4.01.2014 / H.W. Grossmann

-oOo-

Svisa vivo

CDELI

Asembleo de la Asocio de la Esperanto-Amikaro de CDELI

Sabaton 8-an de marto en la CDELI-salono

10h00 : Kafuma ricevo de la alvenantoj.

10h30 : Malfermo de la Asembleo

Tagordo

Protokolo de la pasintjara Asembleo okazinta la 2an de februaro 2013.

Financa Raporto.

Raporto de la kaskontrolantoj.

Porinforma laŭtleĝo de la Raporto de CDELI al la Biblioteko.

Diversaĵoj.

La Amikaro de CDELI ricevos poŝte tiujn raportojn, sed tio ne malhelpu neĝisnunajn donacintojn ankaŭ partopreni la asembleon.

Kultura programo

La kultura programo sekvonta la Asembleon estos dediĉita al Edmond Privat (1889-1962) naskiĝinta antaŭ 125 jaroj.

Claude Gacond intimigos nin kun la neordinara vivo de la aŭtoro de *Aventuroj de pioniro* kaj de *Vivo de Zamenhof*, kiu ne nur estis la unua biografo de la iniciatinto de la *Lingvo Internacia*, sed ankaŭ la unua historiisto de Esperanto mem. La tempo pasas kaj lia verkaro pli kaj pli apartenas al la estinta tempo. Tamen per sia poemaro *Tra l' Silento*, sia esperantologia kurseto *Esprimo de sentoj en Esperanto* kaj siaj noveloj kiel *Tamen perdota*, Edmond Privat ne ĉesas ludi avangardan rolon en la esperanta beletro.

Prezento de grandformataj fotoj kaj laŭtleĝigo de karakterizaj citaĵoj el la verkaro de Edmond Privat certe revekos intereson kaj admiron pri la vivo kaj verkaro de la amiko de Hector Hodler, Pierre Cérésolle, Romain Rolland kaj Mahatma Gandhi.

Komuna tagmanĝo inter la 13-a kaj 14-a horoj interrompos la studon, kiu poste konkludiĝos per teumo je la 16h00.

Eblos plu resti kaj kunbabili en la CDELI-salono ĝis la 17h00.

-oOo

4 kulturaj sabatoj en CDELI estos dediĉitaj al metodika formiĝo al la utiligo de la didaktika afiŝaro.

Datoj : 5a de aprilo, 3a de majo, 4a de oktobro kaj 6a de decembro

Tiuj 4 kulturaj sabatoj estos dediĉitaj al la esperanto-instruado per la didaktika afiŝaro. La koncerna instru-materialo estas ege efika komplemento al la tradicia instruado de esperanto, eĉ se ĝia terminaro tendencas emancipiĝi el la terminologia tradicio greklatina, kiu fakte ne konvene priskribas la funkciadon de esperanto. Instruistoj kaj gvidantoj de esperanto-kursoj certe pedagogie **multe profitos el tiuj metodologiaj stud-sabatoj.**

Al la kurs-kotizo de po CHF 20.- por kultura sabato aldoniĝos la kosto de po 10 centimoj por folio je formato-A4, ĉu de la instru-afiŝoj kaj ĉu de la konsilataj ekzercoj.

Tiuj prezoj koncernas la personojn, kiuj antaŭ-anoncos sian partoprenon. Sed tio ne malhelpu la partoprenon al ne-aliĝintoj. Ili simple aldone pagos CHF 10.- por stud-sabato.

Eblas jam konatiĝi kun la menciita didaktika afiŝaro, kaj eĉ mem reprodukti ĝin, tra la kanalo de mia retejo www.esperanto-gacond.ch . Sed aldone al la konsulteblaj afiŝoj mankas la necesaj metodikaj konsiloj, kiujn mi siatempe parole donis al la pedagogoj, kiujn mi didaktike formadis.

Nun realvenis la tempo por pretiĝi al la efika utiligo de tiu instru-afiŝaro. Tial la eblaj interesatoj ekrezervu la menciitajn sabatojn en sia kalendaro kaj sin anoncu tra la kanalo de mia retadreso gacond@bluewin.ch .

Ankaŭ parta partopreno eblos.

La instruonto : Claude Gacond.

Septembra semajnfino kun André Cherpillod

La semajnfino 6an kaj 7an de septembro nia preleganto estos la verkisto kaj eldonisto André Cherpillod, kiu verŝajne prelegos en esperanto la sabaton 6an de septembro kaj franclingve la dimanĉan matenon 7an de septembro. Pli da informoj aperos en la sekva bulteno *SES informas* 2014-2. Sed interesatoj jam rezervu la koncernajn sabaton kaj dimanĉon.

Statistiko pri la studsabatoj en CDELI

Dum 11 jaroj okazis 75 studsabatoj, de la 15a de marto 2003 ĝis la 14a de decembro 2013. Sed fakte entute okazis pli da studsabatoj ! Ekde la jaroj 1999 mi ne povas doni detalojn, ĉar mi zorgas pri la listoj nur ekde 2003.

Mi povas ankaŭ doni al vi la nombron de la partoprenantoj ĉiufoje. Ekzemple de 2003 al 2006 la nombro troviĝas inter po 13 kaj 21. De 2007 al 2013 : inter po 6 kaj 18.

Sed mi ŝatus aldoni la kulturajn seminariojn, kiuj ankaŭ okazis sabate : Claude Gacond gvidis 24 seminariojn ekde 2005 ĝis februaro 2011.

Entute mi gratulas 5 partoprenantojn de la studsabatoj : Gabriel Marchon ĉeestis 69-foje, Anke Brouwer venis 54-foje, André Sandoz partoprenis 54-foje, Luc Allemand venis 50-foje (sed kelkfoje li instruis la komencantojn), Christiane Sixtus ĉeestis 42-foje.

Ĉijare en 2013 10 studsabatoj estis organizitaj. 32 interesuloj partoprenis, sume 110 partoprenoj. Mi gratulas Danielle Carrier, kiu ĉeestis ĉiufoje, bone helpante nin, do 10-foje, Marcel Chevalley 9-foje, Gabriel Marchon 8-foje, Jean Biollay kaj André Sandoz 7-foje, Anke Brouwer kaj Marguerite Buchard 6-foje.

Kompreneble mi ne nombras la instruantojn : Mónica Molnár instruis 64-foje. Mi mem partoprenis 62-foje, sed dum la unuaj jaroj mi ne instruis.

Claude Gacond instruis 32-foje dum la studsabatoj kaj 24-foje dum la kulturaj seminarioj.

Mi ankaŭ dankas al Luc Allemand, kiu instruas la komencantojn, kaj al Stefano Keller kaj Nicole Margot, kiuj pretas anstataŭi nin.

Mi instigas ĉiujn partopreni al la studsabatoj ! La etoso agrablas, ni bone laboras kaj ridas kune. Po unu-foje monate, kutime la 3-an sabaton, ni atendas vin ! La venontaj datoj estas la 18a de januaro, 15a de februaro, 15a de marto, 26a de aprilo (4a sabato pro Pasko), 17a de majo kaj 21a de junio.

Ĝis baldaŭ ! Nancy Fontannaz.

Dankon al la japanaj prizorgantoj de *La Revuo Orienta*

En CDELI la kolektoj de la periodaĵoj ofte ne estas kompletaj. Rilate al la japana periodaĵo *La Revuo Orienta* japanaj kunlaboremuloj ekfaris la neceson por trovi la mankantajn numerojn kaj sendi ilin al CDELI. Bedaŭrinde ilia helplaboro estis grave perturbita. Jen kion tiurilate skribas s-ro Isino Yosio :

Mi ĝojas, ke niaj malnovaj numeroj de la Revuo Orienta fine atingis vin ĉifoje. Ĉifoje ? jes ! Ni sufiĉe antaŭe sendis ilin kaj je nia surprizo ŝipo, kiu transportis ilin, sinkis en la maron pro incendio. La poŝt-oficejo tion sciigis al ni kaj repagis la sendokoston. Helpantoj de la biblioteko denove kolektis malnovajn numerojn, kaj s-ino Koganei Mariko denove enpakis ilin en skatolon kaj resendis ĝin. Fino estas bona, ĉio estas bona.

Jes, ĉio estas bona ! CDELI bone ricevis tiun pakaĵon kaj Andrée Gacond havis la ĝojon povi kompletigi la kolekton de tiu grava periodaĵo *La Revuo Orienta*.

Do dankon al ĉiuj : al la helpintoj en Japanio, al la japana poŝto vere honesta, ankaŭ al Mireille Grosjean, kiu malavare iniciatis tiun revu-kompletigon, kaj al Andrée Gacond, kiu ekde baldaŭ 60 jaroj diligente prizorgadas ĉe CDELI la kolektojn de la periodaĵoj, kiuj bedaŭrinde ne ĉiam estas kompletaj.

Alia grava donaco al CDELI el Japanio

CDELI donace ricevis de la Japana Esperanto-Instituto en Tokio gravan libron japan-lingvan de 653 paĝoj, kiu estis ĵus eldonita en 2013. Temas pri la verko de Saka Tadasi, titolita **Biografia leksikono de la esperanto-movado en Japanio**. Ĝin redaktis Shibata Iwao kaj Gotoo Itosi sub kontrolo de Mine Yositaka.

Jen citaĵo el esperantigo de la japan-lingva Antaŭparolo. Ĝi komprenigas la gravecon de tiu verko :

En 1984 aperis el la Japana Esperanta Librokooperativo (JELK) 120-paĝa japan-lingva libreto, titolita "Biografia Leksikoneto de la Japana Esperanto-Movado" kaj redaktita de Tanaka Sadami, Mine Yositaka kaj Miyamoto Masao. Enhavante bazajn informojn pri certa nombro da esperantistoj, ĝi ricevis bonvenigon ne nur de esperantistoj kaj baldaŭ elĉerpiĝis. Ĉi tiu volumo estas ĝia funde reviziita kaj ampleksigita eldono, retitolita sen la sufikso -et- kiel "Biografia Leksikono de la Esperanto-Movado en Japanio".

Esperanto estas ja kultura movado kun unikaj karakteroj. Ĝi estas kunigita per leĝeraj ligoj trans la limo de ŝtatoj kaj nacioj surbaze de la komuna volo kaj ago alpreni kaj lerni Esperanton propravole kaj uzi ĝin kiel komunikilon inter ali-lingvanoj.

Nelonge post ĝia lanĉo fare de Zamenhof estiĝis Esperanta lingvokomunumo, kaj dum pli ol 125 jaroj esperantistoj akumulis diversajn provojn efikigi la uzon de la internacia lingvo. Ankaŭ en Japanio buntaj estis agadoj uzantaj Esperanton, agadoj favore al Esperanto aŭ agadoj inspiritaj de Esperanto. Aliĝis al tio diversaj personoj.

Ĉi tiu leksikono celas priskribi laŭ personoj faktojn en la historio de la Japana Esperanto-Movado. Ĉiu artikolo konsistas el informoj de la koncerna persono pri la nomo, la naskiĝ- kaj morto-datoj, naskiĝloko, lernejoj, alinomoj, kariero kaj esperantaj agadoj, verkoj, referencoj, kaj kunlaborantoj. La principo ne draste diferencas de tiu de la malnova eldono, sed la amplekso de eventualaj pritraktatoj estis vastigita. Krome, kontraste al ties sobra koncizeco, ĉi tiu leksikono intencas laŭeble konkretecon en la informoj, precipe pri la kariero kaj esperantaj agadoj, verkoj kaj referencoj.

Post la elĉerpiĝo de la malnova eldono ĝian reviziadon iniciatis Mine, unu el la redaktintoj, kaj daŭrigis la preparan laboron. En 2005 la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (kies eldona fako estas JELK) oficiale komisiis la revizian taskon al Shibata Iwao, kiu en efektiveco estis jam praktike komencinta koncernajn laborojn en kontakto kun Mine. Origine esploristo pri la studo pri paco kaj pri la rilat-historio inter Japanio kaj Ĉinio, Shibata energie kondukis ambician projekton de grandskala reviziado, ricevante konsilojn de Mine.

Gotoo Hitosi sin anoncis kiel konstanta kunlaboranto en 2006, post kiam eldoniĝis nova "Esperanto-Japana Vortaro" (JEI, 2006), kiun li kunredaktis kiel la vicestro de la redakta komisiono. Dum la redaktado li eksentis pli da interesiĝo en efektivaj uzoj de Esperanto, tiel en socia kiel en lingva kunteksto.

Kvankam la antaŭvidita eldono en 2006 estis maltrafita, la revizia laboro, kun Shibata kiel la centra figuro, glate progresis al la celo. Montriĝis en 2008 tamen, ke

Shibata suferas de kancero, kaj li forpasis en 2010, testamente konfidinte la manuskripton kaj materialojn al Gotoo por kompletigo. La kvanto de la manuskripto estis jam konsiderinde granda, kaj la finpretigo de la manuskripto ŝajnis ne tre malproksima.

En la 11-a de marto 2011 granda tertremo kaŭzis gravajn damaĝojn al la Orienta Japanio kaj Gotoo, loĝanto de la urbo Sendai, estis envolvita en la katastrofon. En tia eksterordinara situacio mondaj esperantistoj afablis montri al li diversformajn zorgemojn, kaj Gotoo estis instigita rekonscii pri la signifo de Esperanto, ĝia rolo kiel interligilo de homoj.

Rerigardate el tia vidpunkto la priskriboj en la manuskripto nun aspektis palaj. Gotoo decidis funde prilabori la manuskripton por igi la priskribojn pli vivecaj, kaj por tio havigis al si sabatan jaron en la akademia jaro 2012 (aprilo 2012 - marto 2013).

Jen ĉi tiel estiĝis la reviziado. Laŭkvante Shibata verkis proksimume du trionojn de la manuskripto kaj li meritas esti la unua redaktinto. Gotoo ne nur aldonis la ceteran parton, sed ankaŭ konsiderinde modifis la artikolojn preparitajn de Shibata kaj aranĝis la tuton. Pri la tuta volumo do respondecas Gotoo.

La redaktintoj ja sincere faris sian plejebilon, sed estas vero, ke multaj aspektoj restas nesufiĉe priskribitaj. Aparte bedaŭrinde estas, ke internaciaj agadoj -- agadoj en internaciaj organizoj, agadoj dum vizitoj al eksterlando, interrilatoj kun eksterlandanoj, kontribuoj al eksterlandaj gazetoj, ktp. -- estas nesufiĉe menciitaj.

Ĉi tio do neniel estas definitiva eldono. Espereble ĉi tiu leksikono donos stimulon al pliaj esploroj de historiaj faktoj kaj al iliaj retaksoj.

Kvankam la ĉefa celo de ĉi tiu leksikono estas laŭpersonaj priskriboj de la historio de la japana Esperanto-Movado, rigardo al la tuta volumo ebligos kompreni la situon de Esperanto en la japana moderna historio. Esperanto certe ne plenumis grandan rolon, sed argumenteblas, ke ĝi ja plenumis multajn rolojn en diversaj kampoj. Se ĉi tiu volumo kondukos al retakso de Esperanto en la japana kulturo, tio estos nemezurebla ĝojo por la redaktinto.

La 26-an de julio 2013, Gotoo Hitasi.

Mi esprimas mian admiron al la japanoj, kiuj nelacigeble laboris cele al la redakto kaj eldono de tiu gravega verko, des pli ke mi scias, ke ili certe plue daŭrigas sian laboron.

Claude Gacond.

Svisa ILEI-Sekcio

Okaze de sia parolado dum la malfermo de la UK en Rejkjaviko, kiel nova prezidantino de ILEI, Mireille Grosjean emfazis la valoron de internaciaj renkontiĝoj en proksimeco, tio estas kun najbaraj landoj. Konsekvence kiel prezidanto de Svisa ILEI-Sekcio (SIS) ŝi devis ekagi.

La 26-an kaj 27-an de oktobro okazis Komuna Seminario de SIS en la lernejo "La Grande Ourse" en La Chaux-de-Fonds. Dudeko da personoj partoprenis, inter kiuj unu el norda Francio, unu el Parizo, du el Liono kaj du el Grenoblo.

Sabate unue disvolviĝis laŭstatuta Ĝenerala Asembleo de la Sekcio, poste prelego pri la pedagogio de Célestin Freinet praktikata en "La Granda Ursino", kiun prezentis Anke Brouwer kaj Mónica Molnár, la respondeculinoj de privata lernejo. Mireille Grosjean atentigis pri diversaj aspektoj de la lernhelpa efiko de Esperanto. Marion Bélisle prezentis la fenomenon de alte dotitaj infanoj kaj la diversajn aspektojn de ilia lernado, evoluo kaj ensociiĝado. Komuna vespermanĝo favoris interkonatiĝon kaj kontaktojn. Dimanĉe matene grupo renkontiĝis kun Claude Gacond por vizito de CDELI, kaj posttagmeze vizitis la belegan internacian horloĝmuzeon de La Chaux-de-Fonds.

Loka vivo

Grava atentigo

La redaktoro de *SES informas* ĉiam ege malfacile malkovras, kio fakte anoncindas rilate al la vivo mem de la lokaj grupoj kaj esperanto-asocioj en Svislando. Kelkaj societoj ĝojige sendas al CDELI sian bultenon aŭ raportojn kaj informojn, sed multaj eĉ neglektas tion. Kiam mi aŭ kunlaboranto redaktas la bultenon *SES informas*, necese mi aŭ li ne troviĝas en CDELI, sed hejme antaŭ la propra komputilo. **Ekde nun aperos sciigoj, nur kiam ili estos alvenintaj akurate al la redakcia adreso, kiu estas indikita sur la paĝo 4-a de tiu ĉi bulteno.** En la koncerna kvadrato ĝi estas klare legebla : gacond@bluewin.ch aŭ Claude Gacond, Chevreuils 14, 2300 La Chaux-de-Fonds. Kaj la *Svisa Kalendaro* ankaŭ klare indikas la redakcian datlimon de la bulteno *SES informas*.

Kaj pli kaj pli strangas la raportoj pri la grupa vivo esperantista. En ili ne plu aperas mencio de la realaj nomoj de la agantoj, sed nur ties antaŭnomoj, aŭ eĉ nur kuriozaj esperantigoj. Ĉiu minimuma konanto pri la grup-dinamiko scias, ke tia supra amikeca sinteno nepre kondukas al socia fermiteco malfavora al asimilado de novaj fortoj. En grup-informilo, eĉ loka, nepre devus aperi la nomoj en ties plenece kaj normaleco. Kiam ili komencas kaŝiĝi sub amikaj kaŝnomoj, tio fakte estas signo, ke la koncerna grupo tendencas al amikeca fermiteco. Kaj fakte la tasko de redaktoro ne estas malkovri, kiu kaŝiĝas malantaŭ pseŭdonimo aŭ stranga nom-esperantigo. La veraj nomoj familiaj, kaj ne nur individuaj aŭ esperantigitaj, estu indikitaj en raportoj.

Kial varbi, propagandi, se samtempe oni kultivas fermitecon ? Ĉu nur por povi poste plendi pri propra kreskanta soleco ? Aŭ ĉu por malebligi al la redaktoro de *SES informas* povi siavice normale raporti pri la koncernaj aktivecoj ?

Claude Gacond

Basel

Esperanto-Societo Basel

Kursoj por progresantoj : 17an, 21an kaj 29an de januaro kaj 7an, 14an, 21an kaj 28an de februaro.

75-a regiona staĝo de esperanto, Mulhouse esperanto, 4-6ajn de aprilo 2014 en la feriejo Le Torrent 4, rue de Mollau, FR 68470 Storckensehn. Anoncado SRK 2013-52.

-oOo-

En Etoy kunvenas la Svisa Koruso

Ĉu vi ŝatas kanti en gaja etoso praktikante esperanton ?

Do simple partoprenu la kant-kunvenojn de la Svisa Esperanto-Koruso en Etoy (VD), ĉe la malnova lernejo – Le Prieuré 1, dimanĉe (10h00-15h45).

Ĝin direktas Elisabeth de Mestral - de.demestral@bluewin.ch

Muzikaj dosieroj estas senditaj por ekzerciĝi hejme kaj faciligi la muzik-legadon. Do kompreneble minimuma laboro estas postulata.

Venontaj kunvenoj : 25-an de januaro, 23-an de februaro, 23-an de marto, 27-an de aprilo.

-oOo-

Genève

La Stelo : Ĝenerala asembleo je la 5a de marto.


-oOo-

Lausanne

Venontaj kunvenoj kun programo: 3an de februaro : Ĝenerala Asembleo. 3-an de marto: Charlotte Blanc Maillard rakontos pri sia vojaĝo en Ĉinio. 7an de aprilo kaj 5an de majo.

La komitato decidis propagandi pri esperantaj kursoj tra projekciado en la kinejo de Lausanne. La bildo aperis 100 foje ekde la 25-a de decembro ĝis la 21-a de januaro. Ĝi restis videbla dum po 10 sekundoj.

-oOo-



Al kongresoj kaj vivo tuthomara

Mia jaro 2013

Unue mi diras al vi miajn plej elkorajn bondezirojn por la ĵus komenciĝinta jaro 2014, al vi foraj geamikoj, foraj ĉar mi estas for... Mi situas nun en la varmeco de Benino. Mi diras al vi bondezirojn por bona sano, multaj ĝojoj kaj ĝuoj ĉiuspecaj, ĉu gustaj, artaj, festaj, amikaj aŭ aliaj laŭ via plaĉo.

Mi nun vivas en Kotonuo en duĉambra loĝejo kun mia komputilo, elektro kaj ret-konekto pli rapida ol tiu de mia svisa vilaĝo. Do ĉio en ordo ! Mi iras al la strato, aĉetas kelkajn tomatojn kaj cepojn, per tio mi preparas saŭcon, mi kuiras rizon, kuskuson aŭ pastaĵojn. Mi lavas miajn vestaĵojn kaj miras, kiom rapide ili sekiĝas ! Mi alvenis la 29an de novembro 2013 kaj revenos al Svislando la 14an de januaro, do baldaŭ. Inter la 29a de decembro kaj la 4a de januaro ni travivis ĉi tie la kvinan Afrikan Kongreson de Esperanto. Ni spertis internacian kongresan etoson ! Pri ĝi vi vidu multajn fotojn en <http://mirejo3.blogspot.com>

Kongreso : Tiu ĉi afrika kongreso estas la tria, kiun mi kun-organizas en 2013. La unua estis je Pasko en Métabief, en franca Ĵuraso, por SAT-Amikaro. La dua estis en Broc apud Fribourg, Svislando ; temis pri kunveno de ĉiuj asocioj svisaj, kiuj laboras por pcedukado. Kaj la tria ĵus finita en Afriko. Nur pro tio jam la jaro 2013 estis plenplena. Sed ni traktu la jaron ekde la komenco.

Fakte mi komencis tiun jaron 2013 en Senegalo kaj finas ĝin en Benino. Amuze ĉu ne ? Post Senegalo mi saltis al Parizo en januaro kaj vidis la urbon kovritan je neĝo. En februaro mi iris kiel kutime al Poznan, Pollando, por miaj studoj pri interlingvistiko. Promenado al Parizo, Caen, Le Havre en aprilo. Finfine mi povis vidi la plaĝojn, kie la aliancanoj atingis Francion en 1944 post perŝipa trairedo el Britio. Fine de aprilo mi estis en Barcelono, partoprenis la floran feston kaj rimarkis la multnombrajn flagojn kubsimilajn, kiuj aludas al sendependiĝemo (ĉar Kubo sendependiĝis de Hispanio siatempe...). Kvin tagojn mi pasigis en Bordeaux, kvin tagojn en Lyon. Ofte mi vizitadas lokon gvidata de esperantistoj, ideala solvo.

« *Tout Doux Tout Doubs* » estas la titolo de teatra kaj muzika spektaklo pri la historio de mia vilaĝo. Mi kun-verkis ĝin, reĝisoris kaj prezentis ĝin. Tiu spektaklo fariĝis socia evento en la vilaĝo, multaj homoj kontribuis, ĉu junuloj, ĉu maljunuloj,

ĉu amatoroj, ĉu profesiaj aktoroj, venis kelkaj ĵus alvenintaj vilaĝanoj por ekkoni homojn. Tiuj aktivecoj diversaj estis granda ĝojo por mi. Ni prezentis la spektaklon dum tri vesperoj en majo.

Nia nordhemisfera somero estas kongresa tempo. Mi unue estis en Herzberg am Harz, en Germanio. Poste mi flugis al Islando. Mi revenis kun japanaj geamikoj, kun kiuj mi promenis ĉirkaŭ mia vilaĝo en Ĵuraso. Septembre mi reiris al Poznan por miaj studoj. En oktobro alvenis Prakash Khadka el Nepalo, sociaktiva junulo, kiu adoptis min kiel avinon. Kun li mi malkovris Taizé en najbara Francio. Li prelegis en diversaj lokoj pri Nepalo, ni vizitis kelkajn urbojn kaj vilaĝojn en mia lando, mi estis lia tradukisto (li uzas la anglan) kaj lia ŝoforo. Post lia foriro restis al mi du semajnoj (dum kiuj mi estis dum tri tagoj en Parizo ĉe UNESCO) por plenigi du valizojn per vestaĵoj por alia klimato : Afriko.

Plie mi fondis kvar asociojn, du pri Esperanto unu en apuda urbo Le Locle, unu en mia vilaĝo Les Brenets, unu por subteni la trajn-linion inter tiuj du lokoj, kaj la lasta rilatas al interkulturaj kontaktoj en mia vilaĝo : « La mondo ĉe via pordo ».

Mia sano estas stabila. Mi vivas sen doloroj kaj plena je energio. Mia familio fartas bone. Mi vidas miajn filinojn fojfoje, kun granda plezuro, same mian bofilon kaj du nepojn. Ĉiuj partoprenis la teatraĵon en la vilaĝo : Marion kaj Samuel estis sur la scenejo, Romain zorgis pri teknikaj aspektoj. En la akto « Muziko » Marion ludis violonĉelon kaj Jolane (Joëlle) kantis. Vi povas aŭskulti Jolane uzante www.jolane7.ch. Mi aŭskultis plurajn ŝiajn koncertojn tra la jaro. Tio pravas, ke mi por-okaze uzas mian loĝejon kiel « bazan tendumejon ».

Dum la tutmonda konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en Germanio, mi elektiĝis prezidanto. Mi do akiris novajn taskojn, plej diversajn kaj interesajn. Tiu establo havas sekciojn, reprezentantojn aŭ kontakt-personojn en 60 landoj.

Mi nenion diras al vi pri miaj planoj por 2014 kaj 2015... grandegaj ili estas... Fartu bone ! Mi estos en Les Brenets en majo, junio, aŭgusto... vizitu min tiam ! Vi estas bonvenaj !

Fotoj de tiu freneza jaro (kiu jaro mia ne estas tia..) vidiĝas sur mia blogo <http://mirejo3.blogspot.com>

Elkore salutas Mireille Grosjean *Nuntempe en Kotonuo, Benino.*

-oOo-

Staĝo de Esperanto-France Est

La printempa staĝo de Esperanto-France Est okazos de la 4a ĝis la 6a de aprilo en Storckensohn en la feriejo Le Torrent, ĉe la alzaca flanko de la Vogezoj post Col de Bussang.

La programo kaj aliĝilo troviĝas en jenaj retejoj :

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

La pdf-prospekto estas elŝutebla ankaŭ per alklako de [Printempa staĝo 2014](#)

-oOo-

Intensivaj kursoj en Greziljono

Invito al **PRINTEMPaS**, intensivaj kursoj kun Radojica Petrović kaj Christophe Chazarein kaj internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1).

De 26a de aprilo ĝis 4a de majo 2014 en la franca Esperanto-kastelo Greziljono.

Retejo: <http://gresillon.org/printempo>

Kontakto: kastelo@gresillon.org, +33-2.41.89.10.34, Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ, Francio

-oOo-

Nova Elano por *Juna Amiko*

Juna Amiko, la revuo de ILEI por junaj lernantoj, havas novan redakoron Stano Marček el Slovakio kaj iras per nova elano al bonkvalita kaj enhavoriĉa eldonado. Stano Marček eldonis kaj eldonas diversajn revuojn kaj verkis sukcesan lernolibron ; do li kutimas plenumi tian taskon, kiel eldonadon de revuo por lernantoj. La dua numero de la jaro 2013 aperos antaŭjarfine. En 2014 aperos 4 numeroj. *Juna Amiko* disponas je granda skipo de kunlaborantoj, entute 12 personoj, kelkaj el ili havas regulan rubrikon, aliaj sendas paĝon laŭ emo. La antaŭa redaktoro Stefan MacGill plu kunlaboros ene de la skipo. Stano Marček ne nur laboras per plej modernaj kaj profesiaj teknikoj, sed esploras pri kontaktoj kun retaj lernpaĝaroj. Plie prezentiĝas eblo havi retajn ekzercojn lige kun la enhavo de la revuo.

La prezo de la abono por unu jaro : Al A-landoj : € 16.-. Al B-landoj : € 11.- (rabato ekde mendo de 3 ekzempleroj). La abono-pago iru al UEA per konto de *Juna Amiko* : juna-l.

Por aboni la revuon al Sébastien Cyprich, Pollando : sebacyp@jabster.pl.

Por kontakti la redaktoron : redaktoro@gmail.com

Abonu! Donacu abonon! Lernu amuze per Juna Amiko!

-oOo-

Rememorigo pri la venonta redakta datlimo de SES informas

Raportoj, sciigoj, artikol-proponoj estu senditaj al la redakcio ĝis la 10a de februaro kaj la bulteno dissendiĝos komence de marto.

Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20,
2000 Neuchâtel, rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo kaj la stilo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Radioprelegoj kiel instrumaterialo kaj metodo de Esperanto-kursoj

Stefano Keller¹

Nuntempe multaj personoj eklernas Esperanton per diversaj modernaj teknikaj iloj kaj metodoj, plejofte retaj.

Unuflanke tio estas granda progreso aprezena, kiu permesas al retuzantoj, kie kaj kiam ajn ili volas, konektiĝi al iu reta kurso, lerni ties lecionojn, skribe respondi sendante la « hejmtaskojn » al iu reta adreso. Poste ĝenerale la lernanto re-ricevas sian laboraĵon tekstan korektita.

Per-retaj kursoj

Aliflanke, tiuj virtualaj kursoj estas kiel la kontaktoj, « amikoj » per-retaj, kiujn oni neniam en la reala vivo renkontas. Kaj lingvo havas esencan « staton », la parolatan. Entute la lernado de lingvo devus iri laŭ tiuj etapoj : aŭskulto → parolo → lego → skribo. Nu, iom

simile, kiel infano komencas lerni paroli en sia gepatra lingvo. Do, en la retaj kursoj, pro ties teknika eco, mankas la viva parto de lingvo, kiu estas esenca por povi lerni la bonan kaj ĝustan prononcmankieron. Samas la problemo, se oni lernas nur el libro, sen viv-voĉa kontakto en la lingvo. Do, la parola praktiko, la flanko de vivplena ekzempla elprononco de sonoj, vortoj mankas en tiuj lernmetodoj. Tiel el la retaj kursoj povas rezulti formiĝo de personoj, kiuj eble flue kapablas legi Esperanto-tekstojn, sed ne povas flue kaj parkere diri frazojn sen eraroj prononcaj aŭ gramatikaj.

Tamen estas solvoj teknikaj, kiuj povas iugrade permesi la akiron de tiuj kapabloj kaj lertecoj eĉ kaze de interreta lernado. Uzo de la reta telefon- kaj konferenc-sistemo Skajpo permesas al la lernanto vidi kaj aŭdi, alparoli la instruanton. Responde la instruanto tuj povas korekti malĝustaĵon en la frazoj de la lernanto. Se tiaj virtualaj renkontoj povas okazi sufiĉe regule kaj ofte, kaj se la helpanto (ofte bonvolulo)

¹ Prilaboranto de la esperantaj arkivaĵoj de SRI, kunlaboranto en CDELI, sekretario de la Esperanto-Amikaro de CDELI kaj laŭokaza instruanto dum la Studsabatoj.

de la lernemulo estas lingve kompetenta, tiam tiu solvo povas esti sufiĉe kontentiga.

Radioprelegoj kiel komplementigo

Alia eblo kompletiga kaze de reta lernado, aŭ por kursanoj, kiuj ja fizike ĉeestas Esperanto-kursojn, sed nur unufoje monate – kiel ekzemple la lernantoj de la *Studsabatoj de CDELI* – estas la aŭskultado de radioprelegoj en Esperanto. Aparte taŭgaj por tia lernado kaj ekzercado estas tiuj radioprelegoj, kies rete publikigita versio aperas ne nur sone, sed ankaŭ tekste. Tio permesas al la lernanto plene profiti de la pliampleksigita efiko de la metodo aŭdvida. Aŭskultante la prelegon, la lernanto povas samtempe ankaŭ legi ĝian tekston kaj tiel tuj vidas la skriban formon de sonoj, vortoj, rimarkas la regulojn kaj preskaŭ sen koncentriĝo pri tiuj detaloj asimilas la lingvon en ties du formoj, skribita kaj prononcata.

Dum farado de iu laboro hejma, kiu ne bezonas fortan intelektan atenton, oni ĉiam povas ion aŭskulti samtempe. Se oni laboras fore de komputilo, la preleg-tekstoj estas preseblaj (sed ĉiam sur papero aliflanke jam uzita aŭ uzota, pro ekologiaj konsideroj) kaj havante ĝin enmane aŭ en legebla distanco, oni povas sekvi la paroladon en la teksto.

Radioprelegoj

Svisa Radio Internacia ĉesis siajn esperant-lingvajn elsendojn en la kurtonda servo dum la jaro 1992. Ni tamen havas en CDELI arkivojn de tiuj radioprelegoj el la 30-jara elsendoperiodo 1962-1992, kiujn realigis *Heidi kaj Arthur Baur* kaj *Claude kaj Andrée Gacond*. Ĉiuj tiuj radioprelegoj

estas bonaj ekzercigaj kaj klerigaj iloj por lernantoj de Esperanto progresantaj.

La prelegoj de ges-roj Baur, kun temoj ĉefe pri la svisa vivo kaj tiamaj aktualaĵoj el ilia registrita aktiva periodo ĉe SRI (1977-1991) nun estas ĉiuj enretigitaj en sona versio. Temas pri entute 620 radioprelegoj aŭskulteblaj el la retejo de CDELI.

<http://www.cdeli.org/Sonarkivoj.html>

La prelegaro de Claude kaj Andrée Gacond (1962-1992), publikigitaj en sona kaj teksta versioj, estas aparte utilaj por la menciita aŭdvida lernado, ekzercado en la lingvo.

<http://www.esperanto-gacond.ch/radioprelegoj.html>

Studsabatoj en CDELI

La lernantoj ekzemple de la studsabatoj en CDELI povus profiti de tiuj trezoroj legante, aŭskultante la prelegojn kaj poste analizante, prilaborante ilin en la kurso. Tiel la unumonata atendo inter la monatfinaj studsabatoj ne estus malplena kaj tiuj radioprelegoj helpus la lernantojn progresi, ne nur lingve sed ankaŭ kleriĝante pri Esperanto, ties historio kaj movado, ĉefaj eventoj kaj defioj, kiujn traktas la temoj de la diversaj radioprelegoj. Pluraj el ili restis ĝis hodiaŭ aktualaj kaj povas alporti konsilojn al la nuna movado. Ni uzu la ilojn, kiuj estas je nia dispono kaj povas signife kontribui al nia progreso !



1984

Svisa Radio Internacia
Swiss Radio International Radio Suisse Internationale

+SSR Svisa Societo de Radio kaj Televido CH-3000 Bern, Svislando

Heidi kaj Arthur Baur kaj Claude kaj Andrée Gacond:



Prelegoj de Heidi kaj Arthur Baur

30 pliaj radioprelegoj de *Heidi kaj Arthur Baur* (jaro 1980) kompletigas la elsendaron de 1977-1991 al 620 radioprelegoj aŭskulteblaj en la sonarkivejo de CDELI (rete publikigitaj komence de novembro 2013) :

<http://www.cdeli.org/Sonarkivoj.html>

Laste aldonitaj prelegtemoj (1980) :

- Winterthur 800-jara
- La svisa partopreno en la ekologia programo de Unesko
- Svisaj farmistoj en Kanado
- Memore al la lasta Universala Kongreso
- Svisa ĝardenista ekspozicio, 2.

- Svisa ĝardenista ekspozicio, 1.
- Terre des Hommes
- Cipraj spertoj
- Fervojo al la flughaveno de Zürich
- La alpa korno, 2.
- La alpa korno, 1.
- La CDELI – Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia
- Lokaj nomoj en Svislando
- Rheinfelden – urbo de post 850 jaroj
- Informado en la tria mondo
- Babilado kun aŭskultantoj
- La feno
- La urbodomo de Winterthur sur nova poŝtmarko
- Distrikto devas elekti kantonon
- Somera tempo

- La pentristo Hans Erni
- La vintra olimpiado ne venos al Svislando
- Svislando kaj Nederlando
- La forigo de atoma rubo
- Novaj svisaj filmoj
- Svisoj en Usono
- La naturamikoj
- La problemo de la infana nutrado
- Bazelo – fino de la Rejna vojaĝo
- Rerigardo al 1979

Prelegoj de Claude kaj Andrée Gacond

Aperis teksta versio (pdf) de 62 prelegoj de *Claude kaj Andrée Gacond* (52 el 1979 kaj 10 el 1980). Ties sonaj versioj jam enretis.

<http://www.esperanto-gacond.ch/radioprelegoj.html>

Temoj el 1979 :

- Intervjuoj kun Perla Martinelli, Tazio Carlevaro, Giorgio Silfer, Fritz Liechti, Claude Piron, Arthur Baur, Jouko Lindsted, Walter Zelazny.
- La per-gesta instruado de Esperanto.
- La ekspozicio « Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando » en la Nacia Biblioteko, Berno.
- Svisa Esperanto-poŝtmarko, Esperanto-balono.
- La situacio de la planlingvoj en Svislando kaj iliaj influoj sur Esperanton laŭ Tazio Carlevaro. Lingwe Uniwersala de Zamenhof.
- Infanlibroj, la kontribuo de Svislando al la porinfana literaturo.
- Aliaj libroj : La fenomeno Svislando, de Arthur Baur ; Ĉu li bremsis sufiĉe, de Johán Valano ;

- Poezia bukedo, de Bertram Potts ;
- Sarkasmoj de Miyamoto Masao.
- Pura naturo kaj naturprotektado.
- Edmond Privat pri la svisa federala sperto, diverseco lingva kaj internacieco.
- CDELI.
- La svisa ĉokolad-fabriko « Suchard », kaj ties kreinto.

http://www.esperanto-gacond.ch/Claude_Gacond_Radioprelegoj-1979.html

Temoj el 1980 :

Vi aŭdos (kaj povos legi), interalie, pri :

- Philippe Suchard, fondinto de ĉokolad-fabriko en Svislando, kiu estis ankaŭ industriisto, ŝipkapitano, kreanto de multaj aferoj, filantropo, vojaĝanto kaj rakontisto.
- La magazino *Monato* ;
- Esperanto en la Universitato de Clermont-Ferrand ;
- La priesperanta rezolucio de Unesko (Montevideo, 10a de decembro 1954, Ivo Lapenna) : La prepara fazo, La defenda talento de Lapenna.
- Kiel funkcias Unesko ?
- Kion faras Unesko ?
- Intervjuoj : kun Perla Martinelli pri verkoj kaj verkistoj ; kun Humphrey Tonkin pri Esperanto, UEA kaj mondorganizaĵoj ; kun Arthur Baur pri aŭtorrajtoj ;
- Gaston Waringhien kaj pliaj temoj.

http://www.esperanto-gacond.ch/Claude_Gacond_Radioprelegoj-1980.html

Konversacio de la esperanto-parolistoj de Svisa Radio Internacia

1: Claude Gacond – Heidi Baur

AB. - Karaj geaŭskultantoj. Niaj programoj en ĉi-tiu kaj en la proksima semajno havas iom alian karakteron ol kutime. En la studio troviĝas nun ĉiuj kvar prizorgantoj de la esperantaj elsendoj de la Svisa Radio Internacia, nome gesinjoroj Gacond kaj gesinjoroj Baur. Ni pensis kune, ke estas tempo, ke ni prezentu nin persone al nia publiko. Efektive, mi parolis dum 37 jaroj antaŭ ĉi tiu mikrofono kaj mia kolego Claude Gacond de post 22. Kaj ne unu solan fojon ni parolis pri ni mem. Tiel ke ni estas preskaŭ anonimaj voĉoj. Ni prezentos nin sur la vojo de reciprokaj intervjuoj, kaj eble nun komencas Claude Gacond demandante Heidi Baur.

CG. - Sinjorino Baur, ĉu vi povus komence prezenti vin mem per kelkaj vortoj?

HB. - Jes, volonte. Mi naskiĝis en Winterthur, tio estas mezgranda urbo en la kantono de Zürich kaj mia nomo estis Heidi Sallenbach. Mi trairis en Winterthur la elementan lernejon kaj la gimnazion.

CG. - Kaj kiel kaj kiam vi konatiĝis kun Esperanto?

HB. - Dum mia infanaĝo mi aŭdis nenion pri tiu lingvo, kun unu escepto: Mi memoras, ke mia

profesorino de la angla lingvo iam komparis Esperanton kun la konata svisa kaĉo farita el diversaj fruktoj, lakto kaj aveno, kiu nomiĝas Birchermüesli. Kompreneble ŝi volis diri per tio, ke Esperanto estas nura miksaĵo, sed mi pensis tiam, ke Birchermüesli ja estas io tre bongusta. Nu, mia vera renkontiĝo kun Esperanto okazis en la universitato de Zürich, kie mi studis samtempe kun Arthur Baur literaturon kaj lingvistikon germanajn. Dum iu prelego de la profesoro, kiu ne estis ege interesa, mi ricevis de mia benknajbaro Baur paperetojn, sur kiuj estis notita la tuta gramatika sistemo de la mondlingvo. Mi legis tiujn folietojn kaj rimarkis, ke dank' al mia ĝisfunda kono de la latina lingvo la plej multaj vortoj jam estis konataj al mi. Pro tio mi lernis Esperanton kvazaŭ ludante kaj ofte babilis kun sinjoro Baur.

CG. - Kiel evoluis poste via esperantista vivo?

HB. - En la jaro 1937 mi ricevis de sinjoro Baur certan taskon. Li havis la ideon krei antologion de la kvarlingva svisa literaturo en Esperanto. Tradukado estas unu el la plej bonaj vojoj al lingvaj konoj. Kompreneble mia kontribuo al tiu dika libro estis modesta, tamen oni

povas trovi mian nomon, Heidi Sallenbach, inter la tradukistoj. En la somero 1939 mi kompreneble partoprenis la Universalan Kongreson en Bern kaj la unuan fojon travivis la sensacion, ke popoloj el multaj landoj interkompreniĝis dank al la sama lingvo. Dum miaj studoj pri germana kaj angla literaturo kaj lingvistiko mi ne multe okupiĝis pri Esperanto. Mi ja devis doktoriĝi kaj poste gajni mian vivon kiel ĵurnalistino. En 1943 mi edziniĝis. Mi fariĝis do sinjorino Baur. Du jarojn poste ni transloĝis al Bern.

CG. - Do vi ja loĝis en Bern, kiam tie en 1947 okazis la unua postmilita Universala Kongreso?

HB. - Certe, kaj el tiu fakto rezultis io tre grava. Dum la kongreso ni gastigis ĉe ni du ĉekoslovakajn Esperantistojn, kiuj instigis nin realigi nian planon, fari prelegvojaĝon tra tiu lando. La samideanoj en Ĉekoslovakujo invitis nin oficiale, plano estis ellaborita, en kiujn urbojn ni venu. La ĉekoslovaka ambasadoro peris al ni senpagan veturadon per la trajnoj. Granda intereso por Svislando ekzistis dank' al la radioelsendoj de profesoro von Salis, kiujn oni estis tie kaŝe aŭskultintaj dum la milito. Tiu vojaĝo estis neforgesebla travivaĵo.

CG. - Ĉu vi povus iomete priskribi tiun entreprenon, tiun vojaĝon?

HB. - Certe. Mi ja verkis post la reveno serion de artikoloj pri miaj

impresoj en orientsvisa gazeto. Ni traveturis landon treege suferintan pro la milito kaj ankoraŭ suferantan pro malsato kaj detruitaj domoj, sed ĉie ni estis gastigataj kun ĝojo kaj eĉ entuziasmo. Ni estis invitataj de Esperanto-kluboj en dekunu urboj. La temo de niaj prelegoj estis la svisa demokratio, nia federalismo, la ekonomio, niaj specialaj institucioj, ekzemple la manko de ŝtata prezidanto, pri kiu oni multe miris en la lando de Beneŝ. Krome ni montris filmon pri la beleco de nia pejzaĝo kaj pri nia fervoja sistemo. Malgraŭ la klopodigaj veturadoj ni ankaŭ trovis tempon por viziti interesajn historiajn lokojn kaj kulturajn belaĵojn dank' al tio, ke amikoj akompanis nin. Ekzemple, dum nia restado en Brno, nia samideano Koĵinek kaj lia edzino veturis kun ni en sia aŭtomobilo al Bratislava kaj ni pasigis tre amuzan tagon. Neniam antaŭe en nia tuta vivo ni trovis en nur tri semajnoj tiom da amikoj, tiom da amikeco kaj interkomprenemo, kaj tio estis nur ebla dank' al la internacia lingvo.

CG. - Kaj verŝajne vi vizitis ankaŭ aliajn kongresojn, ĉu ne?

HB. - En la sekvantaj jaroj mi vizitis internaciajn kongresojn parte sola, kiel ekzemple tiun de Zagreb en la jaro 1953. Mi flugis en la sama aviadilo kiel profesoro Privat, kiu prelegis dum la kongreso pri la usona kaj la svisa federalismoj. Alian kongreson mi vizitis kun la tuta familio. Tio okazis en 1954 en Nederlando. Ni promesis al niaj

infanoj, tiam ok- kaj naŭ-jaraj, ke ili povos kunveni, se ili lernas Esperanton. Ili konsentis kaj mia edzo dum multaj vesperoj konatigis ilin kun la infana lernolibro pri la familio Muso. Ni loĝis en Zandvoort, sed partoprenis ĉiujn gravajn okazaĵojn en Haarlem. Nia filino tiam vere entuziasmiĝis por la movado. Ŝi veturis kun amikoj al la infankongreso en Bruselo kaj en 1958 ŝi akompanis min al la Universala Kongreso en Mainz. Ŝi eĉ ludis en la teatraĵo la Neĝulinon kaj malgraŭ ĉiuj taskoj lernejoj ŝi daŭre iomete okupiĝis pri Esperanto kaj korespondis dum pli ol dudek jaroj ĝis hodiaŭ kun germana samideanino, kiun ŝi nur en la lasta somero renkontis en Budapeŝt' la unuan fojon.

CG. - Kaj ĉu vi ankaŭ instruis Esperanton?

HB. - Ĝuste pro mia instruado mi partoprenis la kongreson de Mainz, ĉar mi volis konatiĝi kun la Cseh-metodo. Sinjoro Cseh persone donis didaktan kurson. Mi admiris lian lertecon kaj viglan instruadon, sed mi mem prefere instruas laŭ la gramatika metodo. Kiam doktorino

Peter Rüetschi iniciatis kaj organizis koordinitajn Esperantokursojn en ok eŭropaj landoj mi transprenis la lecionojn en la kadro de la popol-altlernejo en Zürich kaj poste en Bern. Kune kun sinjorino Peter mi estis ellaborinta etan kompendion, laŭ kiu oni laboris en ĉiuj aliĝintaj kursoj. Tio necesis, ĉar la plano estis, ke post la kvina leciono reciproka korespondado komenciĝu. La ideo estis bona, ne mankis la lernantoj, sed mankis la persistemo koncerne la korespondadon. Simptomato, kiu ne nur validas por Esperantistoj.

AB. - Vi aŭdis la unuan el kvar prelegoj, kiuj estas dediĉitaj al la geparolistoj de la Svisa Radio Internacia. Ni daŭrigos. Ĝis reaŭdo!

La dua el la kvar intervjuoj aperos en venontaj numeroj de SES-informas.

Aŭskultu ĉi tiun radioelsendon de Svisa Radio Internacia (SRI) en la reto:

http://www.esperanto-gacond.ch/Claude_Gacond_Radioprelegoj-1984.html

Spektu kaj diskonigu la filmon « Esperanto » !

Sur la DVD-ujo oni povas legi :
« Ĉi tiu filmo de la reĝisoro Dominique Gautier proponas vojaĝon tra la mondo renkonte al la historio de la lingvo Esperanto, al ĝia strukturo kaj al ĝiaj hodiaŭaj parolantoj. Kaptitaj en la diverseco de siaj aktivaĵoj kaj vidpunktoj, la vortoj de tiuj lingvouzantoj interplektiĝas rivelante pecon post peco kiel konkretiĝas ĉiutage la utopio de ties iniciatinto Ludoviko Zamenhof. »

Vito Markovo anoncis la aperon de la filmo sur ties retpaĝo : « Akurate aperis la DVD de la filmo < Esperanto > por la 86a SAT-kongreso en Madrido. Fakte la DVD estis liveritaj precize la 26-an de julio, festotagon de Esperanto ĉar dato de publikigo de la *Unua Libro* en 1887 ! Entute estas 2000 ekzempleroj [...] Plia projekciado de la filmo okazis julie en Saint-Amand-Montrond dum OSIEK kaj kompreneble en Madrido dum la kongreso. Eĉ se la leona parto de la projekto finiĝis, la celo ne estas atingita. Nun ekas la preskaŭ plej grava parto : disvastigo kaj utiligado de la produktita materialo, helpe de la tuta Esperanto-movado kaj direkte al neesperantistaj publikoj. La eldonkooperativo de SAT plu kunordigos tiun parton de la projekto, kaj laŭ la gvidrezolucio de la Madrida kongreso : < [...] petas kunhelpon de ĉiuj SAT-anoj (kaj ne-SAT-anoj !) por disvendi kaj utiligi la filmon *Esperanto*, eldonitan de SAT-eldonkooperativo, interalie per preparo de diverslingvaj prezento-tekstoj en

la retejo de la filmo, partopreno en la reteja forumo, organizo de projekciadoj, disponigo de provokzempleroj al recenzontoj kaj al instancoj favoraj al nia movado kaj regule kontaktataj de amas-komunikiloj.

Nun tempas vivi la filmon ! »

(rs) Spektante la filmon (eblas vidigi subtitolojn en 22 lingvoj !) vi vidos, ke la temo pritraktiĝas laŭ nuntempa kaj historia vidpunktoj. Prezentiĝas inter aliaj la dokumentoj de la muzeo en Bjalistoko kaj same okazas vizitoj al aliaj lokoj aŭ institucioj gravaj por la historio de Esperanto. Intervjuiĝas ne nur fakuloj sed ankaŭ junaj kaj malpli junaj esperantoparolantoj, kiuj klarigas siajn motivojn por la uzo de la internacia lingvo en interhoma komunikado dum renkontiĝoj kaj kulturaj aktivecoj. Specialan akcenton ricevas la filmo per muziko kaj kantoj en Esperanto.



Retadreso : www.esperantofilm.com

La DVD mendeblas ankaŭ en la libroservo de CDELI. Prezo : Fr 25.-

Komitatano Z

Bruno Graf inspiriĝis de ĉi tiu fama komitatano por propraj pripensoj.

En la revuo *La Ondo de Esperanto* aperis regule antaŭparoloj de *Komitatano Z*, kiu atente observas kaj parodias la movadon, kritikas la malfortojn, sed ankaŭ laŭdas bonfarojn. Oni ne konas la nomon de la aŭtoro, sed laŭ la trafa enhavo de la artikoloj devas esti aktivulo, kiu bonege konas la movadon, ties gvidantojn kaj la aparaton en Roterdamo. La redaktoro de *La Ondo*, Aleksander Korĵenkov, kaŝas la nomon de la sprita verkisto. Oni nur havas supozojn kaj iu rimarkis, ke povus esti pluraj skribantoj.

Mi legis tiujn antaŭparolojn ĉiam kun granda intereso kaj bedaŭras, ke ili nun aperas nur sporade. Ja mi ekhavis la ideon mem verki tian tekston, sen la pretendo esti samnivela. La stilo de *Komitatano Z* estas afabla, ne skandalserĉa kiel en *Libera Folio*, ne supereca kiel en *Heroldo komunikas*. Onidire la oficiala organo de UEA, la revuo *Esperanto*, devus esti pli memkritika. Ni baldaŭ scios, ĉu la nova redaktoro, *Fabricio Valle*, produktos altnivelan revuon aŭ ĉu nur estos nova pakaĵo.

Jam pasis pli ol kvin jaroj de post mia gvida rolo en la Svisa Esperanto-Societo. Mi sentas la distancon kaj perceptas iujn fenomenojn alimaniere. Tio estas tute

normala procezo. Siatempe estis Claude Piron, kiu influis min plej multe, kiam mi serĉis argumentojn por prezenti esperanton. Li redonis al mi la kredon al esperanto kaj la kuraĝon pledi por ĝi. En la kulturo kaj politiko esperanto apenaŭ videblas. Tro ofte homoj demandas, ĉu esperanto ankoraŭ vivas.

La kredo al esperanto fare de la esperantistoj estas mirinda fenomeno, jam fokusita en la Interna Ideo. Simile kiel religiuloj oni kredas je la valoroj kaj estonto de la Internacia Lingvo sendepende de la publika opinio. Jam en la frutempo oni parolis pri sankta afero. Ne surprizas, ke oni taksas nin kelkfoje stranguloj. En tempo, kiam la angla lingvo konkeras la mondon, ni esperantistoj pledas por planlingvo. Ni havas tute bonajn kialojn, sed la homoj ne volas aŭskulti kaj kompreni... Estas kurioza situacio kaj Claude Piron diagnozis, ke la perceptado de la homoj estas falsigita. Oni rajtas supozi, ke Esperanto pluvivos danke al la forta kredo.

Por tiuj, kiuj ne kredas, mi riskas alian pretendon. Oni aŭdas kelkfoje, ke esperanto pluvivos pro la evoluigo en interreto. Efektive multaj homoj lernas la lingvon per interretaj kursoj. Bedaŭrinde malmultaj el ili aliĝas al landa asocio aŭ al UEA. Kiel skeptikulo mi dubis pri la prosperiĝo, sed post kiam mi renkontis dum internacia kongreso al mi ne-

konatan svison, kiu lernis perrete kaj parolis sufiĉe flue, mi iĝis necerta. Kiam dum tiu kongreso la merit-plena Humphrey Tonkin emfazis, ke ni staras eble antaŭ turnopunkto, mi pretas iĝi optimisma.

Sed ĉu tiu interreta sperto ne trompas ? Kiam mi trairas ekzemple la liston *Landa Agado*, mi trovas ĉiam la samajn korespondantojn. Ili reciproke respondas al ĉiuj, ne nur al la sendinto, ankaŭ nekoncernitoj ricevas la mesaĝon. Finfine Renato Corsetti donas la benon, dankante al la partoprenantoj. Tio estas teda por multaj, kiuj ne estas interesitaj. Kaj enŝteliĝis la manio uzi nur la antaŭnomojn kvazaŭ temus pri familio. Ofte mi ne scias, kiu estas Carlos, Tom, Martin... Mi petus uzi ankaŭ la familian nomon, ĉar multaj portas la saman antaŭnomon. Verŝajne la esperantistoj konsideras sin amikoj kaj estas influitaj de la angla kutimo alparoli sin per la antaŭnomo.

UEA ricevis novan estraron, novan prezidanton kaj novan strategian planon en Rejkjaviko. Tio estas promesplena. Mark Fettes ŝajnas esti la plej kapabla estro post la ĝentila akademiano Probal Dasgupta. Ambaŭ estas profesoroj, sed profesoroj ne samtempe estas gvidantoj. Mi donus al Fettes anticipe laŭron, ĉar li jam pruvis siajn kapablojn en projektoj kaj montris sin gvidanto. Tuta stabo kaj li ellaboris la strategian planon, lanĉitan en Rejkjaviko kaj findiskut-

otan en Buonaero. Kiam mi legis, ke temas pri 40-paĝa dokumento, mi dubis pri la utileco. Teorio kaj praktiko estas du diversaj kampoj. Nun aperis feliĉe resumo kaj strategiaj prioritatoj. Tute prave la unua agadkampo estas la konsciigo pri esperanto.

Mi citas la unuan alineon :
« *Modernigi kaj kompletigi la publikan bildon pri Esperanto. Atingi, ke Esperanto estu vaste komprenata kiel moderna, vivanta lingvo kun unika historio kaj dinamika kulturo.* »

Efektive la plej granda malforto estas la eta prestiĝo de esperanto en la publiko. Se oni povus levi ĝin, multaj aŭ amasoj pretus lerni la lingvon. Tiel ke foje oni legus ĉe la flughavenoj ne plu *take off*, sed *ekflugo*, ne plu *fasten seat belts*, sed *metu la sidtenilon*, ne plu *landing*, sed *alteriĝo*.

Ĉu la tiel nomata fina venko de Esperanto vere estas dezirinda ? Finvenkistoj ekzistas nur en la cerbo de la Civitanoj. Esperanto perdus la intimecon kaj niaj movado kaj organizo iĝus superflujaj, se nia kara lingvo disvastiĝus kiel epidemio. Jam hodiaŭ nia lingvo vivas. Esperanto bonege funkcias kiel internacia helplingvo aŭ alternativa komunikilo. Ni esperu je la natura evoluo.

Bruno Graf.

Biografia noto pri recenzinto

En *SES informas* 4/2013 aperis du recenzoj de **Stanislav Belov** pri la libroj *Mondo de travivaĵoj* (Tibor Sekelj) kaj *La papilio* (Luiza Carol). Nun postsekvas biografiaj informoj pri la recenzinto.



Li naskiĝis en 1947, estis lokhistoriisto en la rusa urbo Tjumeno (Siberio) kaj laboris ĉi tie en la urba muzeo de 1995 ĝis 2010. Nun li estras publikrilatan sekcion en subfirmao de la konzerno Gasprom.

Li uzas Esperanton por internacia komerco kaj aliaj praktikaj celoj. Belov verkis artikolojn pri historio de juda komunumo, politikaj persekutoj de 1920-1950, loka regionstudado, industrio, ktp. Entute li publikigis pli ol 30 sciencajn kaj pli ol 30 scienc-popularigajn artikolojn. En 2009 aperis lia unua libro (artikolaro). Jen katalogo de liaj verkaĵoj en lia blogo sub la retadreso : <http://tinyurl.com/od48bpv>

Li esperantiĝis per la kurso de Boris Kolker en la jaro 2009 kaj partoprenis plurajn universalajn kongresojn. Li esperantigis kaj publikigis siajn historiajn artikolojn sur la interreta servo Ipernity. Tie li ankaŭ raportas pri rusaj novaĵoj kaj verkis multajn recenzojn pri filmoj kaj esperantaj libroj.

-oOo-

Indekso enhava de *SES informas* Jaro 2013

Favore al retrovo de artikoloj kaj de informoj aperintaj en nia organo jen indekso de la pasinta jaro 2013.

La redaktoro: Claude Gacond.

Mallongigoj :

e-o = esperanto

e-a = esperanta

e-ista = esperantista

e-isto = esperantisto

i-a = internacia

n = numero

p = paĝo

ps = pseŭdonimo de

tp = titolpaĝoj

vd = vidu

Titolo de libro, verko aŭ periodaĵo

A

Adjévi Adjé : n1p12-13, n2p8, n4p23.

AK = Afrika Komisiono de UEA : n1p12-13, n2p8-9, n3p7, n4p23.

AKE = Afrika Kongreso de Esperanto : n1p12, n2p4, 9, n3p7-8, 28, n4p23.

AikidEo : n4p12.

Aikido : n1p9, n4p12.

Ajno (Miĥalski Eŭgeno) : n2p33.

Akademio de E-o : n3p24, n4p31.

Alaniz Teresita : n3p24.

Aliro al la mistera Jean Ribillard (Karpunina Lena) : n3p26.

Allemand Luc : n1p5-7, 39, n3p4-6, 19, n4p2, 9, 14, 19, 22.

Alofa Karlo : n2p8.

Amplifiki : n4p19.

Amouroux Jean : n3p29.

Anĝelmonto (Meyer Conrad Ferdinand) : n3p36.

Antigona : n2p27.

Apostolo de libereco (MacDermott Mercia) : n4p26.

Arakelian Karine : n3p23.

ARKONES : n2p7, n4p12.

Armide Guillaume : n4p13.

ABeE = Asocio de Beninaj Esperantistoj : n1p13, n2p8.

Asocio de la Amikaro de CDELI : n1p5, 39, n2p36.

Asocio E-o-Genève-Régions : n1p39, n2p35, n3p38, n4p3.

Auld William : n1p21-28.

Aŭstralia Antologio : n4p25.

AEA = Aŭstria E-o-Asocio : n1p3.

Aŭstria Nacia Biblioteko (Vieno) : n3p31.

Aventuroj de pioniro (Privat Edmond) : n2p22.

B

Baghy Julio : n1p39, n2p29.

Baláž Peter aŭ Petro : n3p25, n4p16.

Baldursson Ragnar : n3p24.

Baumgartner Carlo : n3p2, 9.

Baumgartner Dorothee : n3p2.

Barboni Grazia : n4p13.

Baur Arthur : n2p25-26, n3p6-7.

Bavara Ŝtata Biblioteko (München) : n2p31.

Beaufront Louis de : n2p26.

Beletra Almanako : n4p26.

Bélisle Mario : n3p6.

Bélisle Marion : n1p7, n3p6, 27, n4p2, 7, 9.

Belov Stanislav : n4p25-28.

Benoît Jean-René : n3p29.

Benvenuti Maria : n3p10.

Béatrix Sonia : n1p5, n2p36.

Bildoj kaj demandoj (Lundberg Hokan) : n2p34.

Bol Jacques : n2p28.

Bornet Laure : n3p10.

Blanc Maillard Charlotte : n1p4, n2p5, n3p2, 9, 12, 14, n4p12.

Blanke Detlev : n2p26-27, 30.

Boirac Emile : n3p29.

Borsboom Ed : n2p17, n3p35.

Bosserdet Marguerite : n2p20.

Bourot Suzanne : n4p30.

Brandenburg Ulrich : n3p24.

Braun August : n4p10

Brouwer Anke : n4p6.

Buhlmann David : n3p10.

Buijnsters Piet : n3p34.

Buller Osmo : n3p24.

Burgbacher Laurent : n1p7, n3p5-6, 27, n4p7.

Burgbacher Murielle : n4p2.

C

Camacho Córdón Jorge : n3p26.

Caraco Jean-Claude : n2p29.

Carlevaro Tazio : n2p27-28, n3p10, n4p6.

- Carmen* (Bizet) : n1p14, n4p38.
 Carol Luiza : n2p18-34, n3p26, n4p26-28.
 Carrier Danielle : n1p5, n2p36, n4p2.
Cent jaroj de originala Esperanto-literaturo en Serbio (Janicic Dimitrije) : n3p26.
 CDELI : n1p5-7, 15, 17, 21, 39, n2p19, 22, 28, 31, 35-36, n3p6-8, 12, 22, 26, 28, 38, n4p3, 11, 22.
 Cérésolle Pierre : n2p21.
 Chapman Arono : n2p34.
 Chaves-Walder Verena : n3p2.
 Chazarein Christophe : n4p15.
 Chmielik Tomasz : n2p22.
 Claesson Helen : n2p34.
 Common Charmian : n1p8.
 Conseil Suisse de la Paix : n1p9.
 Cool Gerard : n3p34-35.
 Corsetti Renato : n2p33-34.
 Courtenay Jan Baudoin de : n2p29.
 Cseh Andreo : n2p23-24, 29, 33.
- Ĉ**
Ĉu vi kuiras ĉine ? (Piron Claude) : n2p33.
- D**
 Damourette Jacques : n2p28-29.
 Dasgupta Probal : n2p22-23, n3p24-25.
 Daubercies Sonia : n1p4, 12, n2p5, n3p2, 9, 12, 14, n4p12.
 Deguchi Onisaburo : n4p12.
De hajko al hajko (Camacho Cordón Jorge) : n3p26.
 De Mestral Dominique : n1p5, 21, n3p4, 7.
 De Mestral Elisabeth : n3p6-7, 39, n4p10.
 Desbrières Emmanuel : n4p2.
Dictionarium Museologicum (Sekelj Tibor) n4p26.
 Di Vetta Arlette : n3p4.
 Dockhorn Birke : n4p15.
 Dovat Lucienne : n1p4, n4p10-11.
 Ducret Aïdonidis Laurence: n3p10.
- E**
 Ecole d'Humanité : n3p34-35.
 Eiffel : n1p4.
 Eisenegger Elisabeth : n3p10.
 Ekspozcio pri E-o : n1p4, 12, n3p12-13, n4p11.
 Engholm Stelan : n2p24, 29.
 Erbeta Marcel : n2p20.
 Ertl István : n3p25.
Eskapo (Grochowska Ewa) : n3p26.
E-a ret-radio (Oberndorfer Anton) : n4p28.
 E-o-Klubo Will : n1p39, n2p35, n3p38, n4p3.
- E-o-Lehrbuch - Die i-ale Sprache in Farbe* (Wittenberger Theodor) : n3p36-37.
 E-o-Societo Basel : n1p39, n2p35, n3p38, n4p3, 9.
E-o Triumfonta : n2p31.
Espero (filmo Gianpaolo Simone) : n3p24.
 Essou Sébastien : n2p8.
La Eta Princo (Saint-Exupéry) : n3p15.
Etnismo : n3p8.
 Eŭropa Komisiono : n4p31.
 EU = Eŭropa Unio : n1p8, 16, n4p13.
 Evlogieva Mariana : n3p24.
- F**
Faust (Goethe) : n2p32.
 Favre Alain : n3p4, 4p30, 33, 35-40.
 Fayet Jean-François : n2p23
La fenomeno Svislando (Baur Arthur) : n2p25-26.
 FESTO = Festivalo E-ista Somera Terure Organizita : n4p18.
Festolibro Gacond : n2p18-34.
 Fettes Mark : n3p24-25.
 Fischer Peter : n2p17.
 Fischer Wolfram : n3p7.
 Fontannaz Nancy : n1p2, 5-6, 15, n2p2, 19, n3p3-4, 7-8, 34, n4p4, 22.
 FEI = Franca E-o-Instituto : n1p9.
 Frauchiger Benno : n1p12, n3p4-5, 8, 27, n4p9-10.
 Freinet Célestin : n2p20.
 Friedensdorf : n1p9.
 Friedly Georgette : n3p10.
- G**
 Gacond Andrée : n1p5, n3p4.
 Gacond Claude : n1p1-6, 39, n2p1-3, 18-34, 36, n3p3-4, 6-8, 12, 34, n4p1, 4-5, 10, 24.
 Gagnebin Henri : n3p16.
 Ganvié : n2p9.
 Garçon François : n4p29.
 Gbadamassi Latifou : n1p13, n2p8.
 Geheeb Paulus : n3p34.
 GEA = Germana E-o-Asocio : n1p3.
 Ghimire Bharat : n3p23.
 Glättli Ernst : n3p4, 10.
 Goes Heidi : n3p25.
 Graf Bruno : n3p4, 7, 13, n4p13-14.
 Graf Verena : n1p8.
Grajnoj en Vento : n2p20.
 La Grande Ourse : n1p5, n2p20, n3p27, n4p11.
 Griffin John Howard : n2p21.
 Grímsson Ólafur Ragnar : n3p23.

Grochowska Ewa : n3p26.
Grosjean Joëlle aŭ Jolane : n4p8.
Grosjean Mireille : n1p2, 4-10, 12-14, 16, n2
p2, 4-5, 7-9, n3p2-9, 16, 23-25, 27-28, n4p4,
6, 10-12, 23.
Grossmann Hans-Werner : n1p2, 4, 11, n2p2,
n3p3, 5, 10, 28, n4p4, 6.
GELB = Groupe E-o Les Brenets : n1p7.
Grundtvig : n1p5-6, 8, 15-16, n2p3, n3p6, 8.
Gubbins Paul : n4p13.
Gudskov Nikolao : n3p24.
Guillaume Charles-Edouard : n3p29-32.
Guinemer Adrien : n2p17.
Gunnarsson Illugi : n3p24.
Gutiérrez Maritza : n3p24.

Ĝ

Ĝemelaj urboj : n2p5.

H

Haase Hella S. : n3p32-35, 37.
Haenni Ueli : n1p12, n3p4, 13, n4p23.
Handzlik Georgo : n4p13.
Haupenthal Irmi : n2p26, 34.
Haupenthal Reinhard : n2p23, 29-31, 34.
Hejm-Landa Muzeo (Lauda-Königshofen) :
n2p31.
Henriksen Kim : n4p13.
Hensel Isa : n2p17.
Heroldo de E-o : n2p31.
Högni Vilhjálmsson Hannes : n3p24.
Houenavo Pierre : n2p8.
Huang Yinbao Trezoro : n3p25.
Huguenin François : n3p10.
Huguenin Noël : n3p10, n4p6.
Humair Jacques-André : n2p34.
Humbert-Fink Yvette : n3p10, n4p6.
Hundertwasser : n1p3, n2p5, n3p2, 9.
Hungario : n3p25.

I

Ido : n2p27-28.
Iltis : n2p34.
Indekso de Universala Lingvoj en Svislando
en Vikipedio : n4p28.
La infana raso (Auld William) : n1p21-28.
Instrui Dokumenti Organizi : n2p6, 34.
ILEI = I-a Ligo de E-istaj Instruistoj : n1p9-
12, n2p7-8, n3p9, 12, 23-24, 27-28, n4p23.
I-a Biologia Olimpiado : n3p13.
IJS = I-a Junulara Semajno : n4p16-18.
I-a Oficejo de Pezoj kaj Mezuriloj : n3p29.
ISAE = I-a Scienca Asocio E-ista : n3p29.
Inventista Foiro : n2p5.
Itala E-o-Federacio : n4p13.

Itala Kongreso de E-o : n4p13-14.

J

Jacobsen Jesper : n3p26.
Jacquard Albert : n1p4.
Jakobsdóttir Katrin : n3p24.
Janicic Dimitrije : n3p26.
Japana E-o-Instituto : n1p5.
Javal Emile : n3p29-30.
Jespersen Otto : n2p29.
Jisheng Ma : n3p24.
Johansson Sten : n4p27.
Jung-kee Lee : n3p25.
JES = Junularo E-ista Svislanda : n1p7, n3p6.
JES = Junulara E-o-Semajno : n3p16-19.
Juste Andreas : n2p27-28.

K

Kajto : n2p33.
Kästli Hans : n3p4.
Kalocsay Kolomano : n2p29.
Kapriol' (nederlanda frisa grupo) : n4p14, 19.
Karamudini Mohammad : n3p13.
Karpunina Lena : n3p26, n4p27.
Keller Stefano : n1p2, 4-6, 8, 11, 14, n2p2,
18, 36, n3p3-5, 7-8, 13-14, 25, n4p4, 11, 22.
KER-ekzamenoj : n1p5, n2p3, n3p6, 8, 10-12.
Kiel akvo de l' rivero (Schwartz Raymond) :
n1p17-21, n2p10-17.
Kimura Goro : n2p7, n3p8.
Klawe Christoph : n1p5, 9, 17, n2p10, 17.
Kofman : n2p32, n4p12.
Koller Alois : n3p10.
Komintern : n2p23.
Korobeinikov Andrei : n3p15-16.
Kóródy Zsófia : n3p23.
Kotona Gazeto : n1p12, n2p8-9.
KoToPo : n3p6.
Kouassi Kouablan Antoine : n4p23.
Koutny Ilona : n2p7, 32.
Kováts Katalin : n2p23-25, n3p10-12.
KCE = Kultura Centro E-ista : n2p19, 28.
Kunming : n3p5, 8, 12, n4p10.
Kvinpetalo en Bouresse : n4p30-40.

L

Lagerlöf Selma : n2p24.
Lagrange Bernard : n4p31, 36, 38.
Lagrange Georges : n4p30.
La Stelo (Genève) : n1p39, n2p35, n3p13-14,
38, n4p3, 11.
Lauda-Königshofen : n3p31.
Laŭzana E-o-Societo : n1p39, n2p35, n3p38,
n4p3.
Lavanchy Eliane : n3p10.

- Lavanchy Jean-Jacques : n3p10.
 Lenino : n2p23.
 Lerru : n1p7, n2p34, n3p22, n4p16.
 Liechti Fritz : n3p9.
 LÍndal Sigurður : n3p24.
 Lindblom Roland : n3p24.
 LK = Lingva Komitato : n3p29-32.
 Lingvo I-a (Zamenhof L.) : n2p30.
 Lingwe Uniwersala (Zamenhof L.) : n2p30.
 Lipari Michela : n3p25.
 Literatura Foiro : n2p27.
 Lösch-Liechti Edith : n3p9.
 Loisse Laürenco : n4p7.
 Lumière : n1p4.
 Lundberg Hokan : n2p34.
- M**
- MacDermott Mercia : n4p26.
 MacGill Stefan : n3p23.
 Magasin du Monde : n1p4.
 Malmalice (Piron Claude) : n2p33.
 Mandirola Michael : n3p24.
 Maradan Mélanie : n3p25.
 Marček Stano : n4p15-16.
 Marchon Gabriel : n1p12, n2p5.
 Margot Nicole : n1p5, 8, n3p5, 7-8, n4p22, 30-40.
 Markthalle en Altenrhein : n1p3, 10, n2p5, n3p2, 9.
 Martinot Yvonne : n4p30.
 Masao Miyamoto : n2p25.
 Mastalerz Lech : n3p24.
 Maurelli Francesco : n3p25.
 Mayer Herbert : n2p32-33.
 Meigniez Sarah : n3p19-22, n4p20-22.
 Meigniez Sylvain : n3p19-22, n4p20-22.
 Meister Thomas : n3p24.
 Meyer Conrad Ferdinand : n3p36.
 Miĥalski Eügeno : n2p33.
 Minnaja Luigi : n3p26.
 La mirinda sorĉisto de Oz (Trad. Broadribb Donald) : n3p26.
 Molera Ana María : n2p31.
 Molera Oedrals Ramon : n2p31.
 Molnár Mónica : n1p5, n2p20-21, 32-33, n3p6, 24, n4p22.
 Monastier Hélène : n2p21.
 Monda Konferenco pri la instruado de E-o : n3p23.
 Mondo de travivaĵoj (Sekelĵ Tibor) : n4p25-26.
 Moon Brian : n3p24, n4p31, 38.
 Morariu Eugenia : n2p29.
- Morariu Tiberio : n2p23-24, 29.
 Moret Sébastien : n2p28-29.
 Morley Tim : n4p15.
 Morocz Istvan : n3p5.
 Morocz Piroska : n4p6.
 MIR = Mouvement i-al de la Réconciliation : n1p9.
 Mueller Johannes : n3p25, n4p15-16.
 Münger Marie-Louise : n1p2, 10, n2p2, 21-22, n3p3-4, n4p4.
 Murat Yilmaz : n3p13.
 Muzeo Robert en Biel : n1p10, n4p6.
- N**
- Napoleono : n1p7.
 Neue Zürcher Zeitung: n1p6.
 Neves Gonçalo : n2p29-30.
 Niclass Narcisse : n1p12.
 Nixon Violet C. : n3p23.
 Nobel-premio : n2p26.
 Noe Julia : n4p2.
 Nourmont Claude : n3p24, n4p31-32.
 Novjara Renkonto : n4p24.
 Nüesch Willy : n3p36.
- O**
- Oberndorfer Anton : n4p28.
 Okazis iam (Ruggiero Nicola) : n3p26.
 Oomoto : n4p12.
- P**
- La papilio (Carol Luiza) : n4p26-28.
 Parentezo (Grochowska Ewa) : n3p26.
 Pasporta Servo : n1p7, n2p4, n3p6, 15.
 Pataki Žofi : n4p16.
 La Perdita Generacio (muzikistoj) : n4p16.
 Perera Ramon : n4p5.
 Perret-Gacond Chantal : n3p10.
 Perret-Gacond François : n3p10.
 Perrin Jean Claude : n1p16.
 Pétermann Françoise : n3p10.
 Pichon Edouard : n2p28-29.
 Pietrzak Barbara : n3p24-25.
 Pilipovic Sasha : n4p13.
 Piron Claude : n2p33.
 Piton James Resende : n3p25.
 Planlingvistiko : n2p26-27.
 Pleadin Josip : n2p30.
 Pochanke Barbara : n3p6, 27, n4p2, 7.
 Pochanke Veronika : n1p7, n3p5-6.
 Pokorny Annemarie : n3p10.
 Poór Veronika : n3p25.
 Privat Edmond : n2p18, 21-22.
 Progreso : n2p28.
 Prometeo : n2p25.

La punĉbovlo de la diablo (Jacobsen Jesper) : n3p26.

R

Ragnarsson Baldur : n3p24.

Randin François : n1p8.

Raola Orlando : n3p25.

Rashōmon (filmo de Kurosava Akira): n4p27.

Reale Cesco : n1p8.

Revue de l'Innovation et de l'Invention en Romandie : n1p12.

La Revuo Orienta : n1p5.

Richter Sviatislav : n3p16.

Rivière Jimmy : n3p10.

Robert Philippe : n4p6.

Rodriguez Oxana, Ricardo kaj Oleg : n4p11.

Rooke Dieter : n3p2, 6, 8, n4p2, 6.

Rosbach Johan : n2p24, 29.

Rousseau Jean-Jacques : n4p6.

Rozenfelde Biruta : n3p24.

Ruggiero Nicola : n3p25.

S

Sabiyumva Jérémie : n4p23.

Saemundsson Hallgrimur : n3p24.

Salon des Inventeurs : n1p12, 39, n3p14.

Sandoz André : n1p6, n2p36, n3p4, 7, 36.

Schäffer Martin : n3p25.

Scherer Paul : n3p10.

Schleyer Johann Martin : n2p29-31.

Schmidt Adolf : n2p31.

Schneller Martine : n1p5, n2p34, 36.

Schneller Richard : n1p2, 5-6, 8, 17, n2p2, 10, 34, 36, n3p3, 6, 29-37, n4p4, 25.

Schuchard Hugo : n2p29.

Schwartz Raymond : n1p21, n2p10-17.

Schw. Friedensrat : n1p9.

SSB = Scio Sen Bariloj : n1p12-13, n3p7, n4p23.

Sekelj Tibor : n4p25-26.

SAT = Sennacieca Asocio Tutmonda : n1p8, 11, n2p4, n3p6, 24.

SAT-Amikaro : n1p8, 10, 14, 39, n2p4, 7, n3p6.

Shadskij Aleksej : n3p24.

Sinha Lakshmiswar : n2p22-24, 29.

SEL = Societo E-o Le Locle : n1p7.

SYM = Societo Yvonne Martinot : n4p30, 33, 38.

Sofoklo : n2p27.

La soldato kiu marŝas (Piron Claude) : n2p33.

Stalino : n2p23.

La Stranga Butiko (Schwartz Raymond) : n2p17.

La Suda Stelo : n2p25.

La Suno Hispana : n2p31.

Svisa Asocio de Edukistoj al la Paco : n4p23.

Svisa E-o-Koruso : n1p5, n4p10-11.

SES = Somera E-o-Studado : n4p14-16.

SES = Svisa E-o-Societo : n1p3-14, n2p3-9, n3p4-10, 14, 23, 28, 40, n4p5-9, 23.

SES informas : n1p6-8, 10-12, 14, 39, n2p3-6, 34, n3p6.

Svisa Asocio de Edukistoj al la Paco : n1p9.

SFERO = Svisa Feria E-a Renkontiĝo : n1p5-8, 12, 15-16, 40, n2p3, n3p6-8, 27-28, n4p2, 7-9.

SIS = Svisa ILEI-Sekcio : n1p5, n2p4, n3p6, 27.

Szilva Szabolcs : n4p15.

Szimkat Annakris : n2p31.

Ŝ

Ŝekspiro : n4p13.

T

Tanner Adrian : n1p8-9, n3p10.

Tchikpe Privas : n1p12-13, n2p8.

Tchokpodo Joseph : n2p8.

Televido Canal Alpha : n1p6, 16.

Tempo rabita (Carol Luiza) : n3p26.

Thibias Jean-Luc : n2p17.

Tiĥomirov Konstantin : n4p15.

Tiŝlar Zlatko : n4p15.

Toki pona (lingvo) : n4p15.

Tolstoï Léon : n1p4.

Tomsko : n3p20, 22.

Tonkin Humphrey : n4p13.

Touchard Pierre : n1p17.

Toussaint Louverture : n2p7.

Traugott Rinaldo Aebi : n3p10.

Tutamerika Kongreso de E-o : n1p13.

TEJO = Tutmonda E-ista Junulara Organizo : n3p24.

U

Ueshiba : n4p12.

Unesco : n3p14.

UEA = Universala E-o-Asocio : n1p8, 11-12, n2p5, 8-9, n3p5, 7-9, 13-14, 23-25, n4p10-11, 25.

UK = Universala Kongreso : n1p8, 10-11, n2p25, n3p7-8, 15, 23-28, n4p23.

La Unua Libro : n1p5, n2p29.

Universalaj lingvoj en Svislando (Künzli Andreas) : n2p6.

UN = Unuiĝintaj Nacioj : n1p8, n3p13-14.

UFE = Unuiĝo Franca por E-o : n3p8.

Urug (Hasse Hella S.) : n3p32-35, 37.

Uzunov Nikolao : n3p26.

V

Vasserot Jaqueline : n3p4.

Vergara Antonio : n3p25.

Verne Jules : n1p10, n4p5.

Veronia (Uzunov Nikolao) : n3p26.

Vigny Marc : n3p10.

Village de la Paix : n1p9.

Vjetnamio : n1p8-9, n2p9.

Volapük : n2p29-30, n3p35.

Von Büren Jean-Thierry : n3p4.

Voyage d'études (Verne Jules) : n4p5.

W

Wandel Amri : n3p24-25.

Weemeyer Anton : n4p10.

Weemeyer Carolin : n4p9-10.

Weemeyer Robert : n4p7.

Weidmann Armin : n3p4.

Weidmann Dietrich Michael : n1p2, 6, 8-10, n2p2, 4, 25-26, n3p3-5, 7-9, 25, n4p2, 4, 8.

Weidmann Nelida : n1p2, 10, n2p2, n3p2, 4, 6-9, n4p2, 4.

Wennergren Bertilo : n4p15.

Werner Erich : n3p10.

Wierzbowski Przemyslaw : n4p15.

Wilson Richard : n3p10.

Wittenberger Theodor : n3p37.

Wu Guojiang : n2p5, n3p5.

X

Xanten : n3p13.

Z

Zaleski-Zamenhof L. C. : n3p24.

Zamenhof Lidia : n2p24, 29.

Zamenhof Ludoviko. L. : n2p22, 26, 29-31, n3p29, n4p32.

La Zamenhof-Strato (Dobrzynski Roman) : n3p8.

Zentralblatt für Bibliothekswesen : n2p31.

Zerbetto Rafael Henrique : n3p25.



Fotis Mireille Grosjean.

Internacia etoso en la Afrika Kongreso. Partoprenantoj travivas unuafoje pri reala kontakto kaj entuziasme ekdiskutas pri estontaj kunlaboraj agadoj kaj pri planado de sekvaj tutaafrikaj renkontoj.

Lucienne Dovat oratoras



Fotis S-ro Vincent Dubuis, prizorganto de la hejmo *La Rozavère*.

UEA disdonas diplomon al siaj membroj, kiam ili seninterrompe membradis dum duonjarcento. Okaze de la pasintsonera Universala Kongreso en Islando Lucienne Dovat estis tiel honorigita per ricevo de tia malofta diplomo atestanta pri ŝia plua fideleco al UEA, eĉ post retiriĝo en la hejmon *La Rozavère*.

En Rejkjaviko Mireille Grosjean transprenis la diplomon kaj ĝin solene transdonis al Lucienne la 25an de novembro okaze de digna ceremonio, informante la publikon pri la fakto, ke Lucienne estas plie honora membro de Svisa Esperanto-Societo pro sia efika poresperanta aktiveco. Nelacigeble kaj efike ŝi instruadis la lingvon internacian per la Rikmetodo iniciatita de Marc Rohrbach.

Cento da personoj ĉeestis tiun neordinaran feston : aliaj gastoj de la oldulejo *La Rozavère*, familianoj kaj geamikoj, flegistoj verde vestitaj kaj dudeko da esperantistoj, inter kiuj anoj de la Svisa Esperanto-Koruso, kiuj belege kantis dum proksimume unu horo.

Kiel montras la foto, Lucienne Dovat starante meze de la publiko, per mikrofono tenita de la SES-prezidantino, dankis ĉiujn festantojn. Tio atestas, ke kvankam ŝi nun aĝas pli ol 90 jarojn, ŝi konservas sian vigecon kaj daŭran amon al esperanto.

Floroj, gratuloj kaj dankoj abundis. Ĉiuj ĝuis tiun agrablan momenton.